

Kazimierz Leja

Adiaŭe...

Karaj Samideanoj,

ĉi tiu eldono de la revuo estas la lasta, eldonata de la Eldonejo HEJME, kaj la lasta, redaktata de mi, kiel ĉefredaktoro, dum kvin pasintaj jaroj. PE revenas kiel oficiala organo de Pola Esperanto-Asocio en manojn de Samideanoj, kiuj decidis ŝanĝi la formulon de la revuo al la precipe informa bulteno (kontraŭ kio ĝisnuna redakcio sukcese batalis, akirante multajn – precipe eksterlandajn – laŭdojn kaj gratulojn). Tamen, pensante pri nombro de reagoj de polaj abonantoj al niaj artikoloj, enketoj kaj eĉ konkursoj, mi opinias, ke la plimulto de ĝisnunaj polaj abonantoj bezonas certe simplan informilon kaj ili ĝin ricevos.

Mi dankas al ĉiuj Legantoj, kiuj per sia morala apogo instigadis nin labori kaj kontinui elektitan vojon. Viaj vigligaj, entuziasmaj eldiroj ludis gravan rolon dum tiuj ĉi 5 jaroj, kaj speciale dum lastaj 2 jaroj, kiam kontraŭ redakcia teamo batalis homoj, ne scipovantaj legi kun kompreno...

Fine, mi volas kore danki al tiuj, kiuj per sia kunlaboro riĉigadis la enhavon de la revuo. Via laboro en normalaj kondiĉoj estus salajrata kaj certe pli aprezata. Sed nia Esperantujo estas, kia estas. Devas sufiĉi nur miaj, redaktoraj dankesprimoj. Eĉ la novelektita Ĉefa Estraro de PEA ne volis danki al redaktoroj

por ilia laboro; vortojn de dankesprimoj (vidu p. 31 en pola lingvo) ricevis nur mi kiel **eldonisto**. Malgraŭ ĉio mi dankas.

Ĉiuj kajeroj de *Pola Esperantisto* en PDF-formato estos senpage elŝuteblaj de la retpaĝo de Eldonejo HEJME ankaŭ dum la tuta 2008 jaro. Ankaŭ librojn eldonitajn de ni Vi povos mendi pere de mendilo, troviĝanta tie (www.hejme.com.pl).

Adiaŭante la Legantojn de PE mi kore dankas al tiuj, kiuj decidis jam aboni la novan revuon **SPEGULO**, instigante pluajn fari la samon. NE elektu inter PE **aŭ** **SPEGULO** – abonu ilin ambaŭ! Aldone al tiu ĉi kajero de PE ni enmetas abonkuponojn por ambaŭ gazetoj, petante pri fruaj pagoj (plej bone ĝis la 15^a de januaro 2008).

Aventure ni marŝas en la Novan Jaron. La 23^{an} de novembro 2007 pola tribunalo registris la novan revuon **SPEGULO**, kiu celas kontinui klerigan kaj informan lilion de la ĝisnuna *Pola Esperantisto*. Ne mankos tekstoj ankaŭ por komencantoj kaj plimulto de Viaj ekspektataj temoj trovos tie sian lokon. Simile al redaktado de PE: ni atendas Viajn kontribuojn, ankaŭ debutojn, promesante, ke la listo de kunlaborantoj neniam estos fermita. Skribu pri viaj lingvaj problemoj kaj demandoj, ankaŭ pri atingoj. La nova *aventure* daŭru... **KL**

Tomasz Chmielik

Komenciĝas nova aventuro...

Kun ĝojo mi volas sciigi la gelegantojn de *Pola Esperantisto*, ke la unua numero de *SPEGULO* jam prespretas. Dum la redakcia kunsido en Krakovo (24-11-2007) ni diskutis fervore kaj arde pri ĝia enhavo. Mi kontentas pri tio, ĉar kiam kunpuŝiĝas diversaj opinioj, nur io valora, pense instiga kaj atentokapta povas eliĝi el diskutoj.

Ĝuste tian arton diskuti instruadis al ni Kazimierz Leja, kiu per ĉi tiu numero adiaŭas la legantojn de *Pola Esperantisto*. Li faris grandiozan laboron. Kun aro da bonvolemaj kunlaborantoj li renomigis la revuon, al kiu multaj aŭguris porĉiaman malaperon. En la koro restas iom da bedaŭro, sed ankaŭ multe da ĝojo, ke mi havis ĉi honoron kunlabori kun valoraj homoj kaj skribi por arego – jes, arego! – da estimindaj legantoj. Mi subtrekas la vorton „arego”, ĉar en la tempo de profunda krizo de la pola movado, tiuj dekoj da esperantistoj prenis sur sin la respondecon daŭrigi vivon de unu el la plej malnovaj revuoj en Esperantujo, sed ankaŭ la devon helpi per sia mono abonante ĝin kaj abonigante al ĝi multajn aliajn samideanojn.

Do, mi petas, ne miru, kiam ni zorgas pri la estonteco de ĉi tiu revuo, redonante ĝin en aliajn manojn. Forte mi deziras al la novaj redaktantoj, ke ili faru ĉion eblan por ne malaltigi la nivelon

de la revuo, kiun ni pene atingis, farante el la forgesita bulteneto revuon bonfartan, kaj kiel „organo” de la tuta pola Esperantujo malferman al ĉiuj. Des pli dolorigas nun atakoj de kelkaj el inter novelektitaj estraranoj, riprorĉantaj al ni mankon de objectiveco kaj personajn batalojn kontraŭ iuj gravuloj. Tiuj riproĉoj daŭre akompanis nin kaj estis amara pago por niaj komunaj klopodoj kaj strebadoj. Mi povas respondi sincere: neniam estis inter ni la emo ataki iun ajn senkaŭze. Eĉ se ni skribis kritike, nia celo estis bono de la pola movado, ĉiel ni volis elirigi ĝin el pasiveco, montri, ke oni povas fari ion alie, pli efike, pli moderne, ne amatorece.

Tute ne kompreneblaj estis atakoj, ke *Pola Esperantisto* prezentas tiom da literaturo, kaj mankas raportoj, ke iuj iam iel ial kunsidis, trinkis kafon, babilis pri tio kaj alio kaj gajaj iris hejmen. Ĉi tiaj raportoj taŭgas por klubaj bultenoj, kaj ne por la gazeto, kiu ambiciis reprezenti la movadon kun tiel riĉa historio, kun tiom da elstaraj pioniroj. Kiam oni foliumas malnovajn kolektojn de *Pola Esperantisto* oni vidas, kiom da paĝoj prezentis tradukojn el la pola literaturo, kiomfoje oni skribis pri gravaj eventoj, okazaĵoj ne nur movadaj. Do, ni sentis nin heredontoj de tiu „serioza” pasinteco, kaj ne nur de „banala” raportado pri efemeraĵoj,

bagateloj kaj malgravaĵoj.

Ĉiam ni kredis je intelekta povo de niaj gelegantoj. Ni forte esperis, ke unu-sola vojo al la progresigo de lingvokono estas kontakto kun valoraj kontribuaj diversspecaj. Pardonu, ke ofte ni devigis vin al pensostreĉo, mensa aktiveco. Kaj ni ĝojas, tre ĝojas, ke inter vi estis multaj, kiuj komprenis nian celon. Tiuj multaj gekolegoj aĉetadis poste librojn, kiuj aperas pli kaj pli ofte en la polaj eldonejoj, kiel HEJME, LIBRO-MONDO, SKONPRES. Kaj tiu plivigliĝo de eldona agado sekvis nur dank' al vi, dank' al la esperantisto, kiuj deziris iom aktivigi sin en la kultura Esperanto-vivo.

De kelkaj jaroj mi prelegas dum ARKONESOj kaj vidas kun mirego, ke kreskas mia publiko. Pardonu la malmodestan vorton „mia”, sed ĝuste tiel mi volas paroli, ĉar mi scias, ke miaj geaŭskultantoj venas ne nur pro simpatio al mia persono, sed ankaŭ tial, ke ili migros kune kun mi tra malfacilaj temoj. Kaj tiuj ĉi temoj plej ofte rilatas kun historio kaj kun literaturo!

Do, kiam ni decidis aperigi novan revuon, eĉ ne dum momento mi hezitis skribi en la alvoko al la abonontoj:

Ni deziras, ke SPEGULO estu malferma, sen limigaj antaŭkondiĉoj laŭ tendencoj. Ĉiel ni klopodos, ke Esperanto fariĝu perilo inter homoj kun diversaj opinioj, kun malsamaj spertoj. Per SPEGULO ni intencas konvinki esperantistojn, ke la Zamenhofan lingvon ili lernas kaj praktikas ne nur por kongresumi kaj plum-amikadi, sed ankaŭ por vastigi siajn horizontojn.

Jes, ĝuste! Al tiu kultura vojaĝo ni volas inviti ĉiujn. Mi komprenas freŝe bakitajn esperantistojn, ilian timon, ke ili ne kapablas paroli flue, ke ili ankoraŭ ne

povas legi malfacilajn artikolojn. Antaŭ jaroj mi timis same, mi estis tiu proverba „flavbekulo”. Sed mi ne subiĝis al obstakloj kaj duboj. Per legado kaj ankoraŭfoje per legado de literaturaj tekstoj – originale verkitaŭ aŭ tradukitaj (memoru, ke estis la tempo, kiam oni ne povis havi pasporton hejme kaj ne povis vojaĝi eksterlanden laŭplaĉe!) mi enprofundiĝis en ĉiujn sekretojn de Esperanto kaj perfektigis la propran lingvokonon, poste mi konfrontadis mian sciadon kun esperantistoj el aliaj landoj, kiam post 1989 oni povis jam vojaĝi libere. Tiam estis granda kontento kaj ĝojo, ke mi ne postrestis malgraŭ la baroj, kiujn starigis por ni reĝimoj en la Orienta Eŭropo.

Do, ne hazarde ni skribis, ke: „Nin ĉiujn ligas la komuna sperto de tiu memorinda jaro 1989 – *annus mirabilis* – kaj ĉiuj ŝanĝoj, kiuj okazis en la politika kaj socia vivo, kiam finiĝis la komunista regado kaj formiĝis novaj ŝtatoj en la Orienta Eŭropo – en tiu parto de la mondo, kiu estas nia loko surtere. Tial ni volus montri al legantoj la gravecon kaj signifon de la jaro 1989 kaj la sekvo por ni, kaj ankaŭ por Esperantujo”.

Sur la paĝoj de SPEGULO ĉiu trovos ion por si kaj la aperantaj tekstoj prezentos diversajn gradojn de malfacileco. Tio estos grava premiso por niaj klopodoj, ke ni aliru – se eble – plej vastan publikon.

Atente ni aŭskultos ĉiujn sugestojn (eĉ mallaŭdajn!) kaj vian kritikon (eĉ plej severan!). Ni deziras, ke SPEGULO estu por vi, kaj via favora akcepto, instigilo por ĉiam pli diligenta laboro. La revuon kreas ne nur la redakta stabo, sed dekoj da legantoj, kiuj identigas sin kun aferoj

kaj problemoj tuŝataj sur ĝiaj paĝoj.

Ni dissendis centojn da retmesaĝoj, venis dekoj da respondoj. Multaj esprimas sian apogon por niaj klopodoj, deziras al *SPEGULO* sukceson. Venas unuaj abonoj... La eĥo pri *SPEGULO* aŭdiĝas pli laŭte tra multaj landoj. Ni povas nur danki tian konfidon kaj promesi, ke ni faros la plejbonon por ne trompi ĉi tiujn esperojn.

Lige kun la alproksimiĝanta Jubileo de UEA kaj Universala Kongreso okazonta en 2009 cent kvindek jarojn post la naskiĝo de L.L. Zamenhof en Bjalistoko, ni ĝojas, ke per la komuna strebado aperados *SPEGULO*.

La nuna jaro estas ankaŭ *annus mirabilis* por la Esperantaj literaturo kaj kulturo. En la manojn de multaj gelegantoj venis la unua volumeto de *Beletra Almanako*, kiun eldonas MONDIAL (Novjorko) du fojojn jare. Nun estas la vico por *SPEGULO* aperonta kvar fojojn jare en HEJME (Czeladź). Ni ne forgesas pri la plej „aĝa”, sed ĉiam vigla *Literatura Foiro*, kiu atingas siajn gelegantojn ĉiujn du monatojn. Oni diras, ke en Brazilo reaperos la ĉiumonata Fonto. Tia riĉeco povas nur feliĉigi.

Kiagrade ni sukcesos, montros la estonto. En tiu grava momento ni bezonas vian helpon kaj esperas, ke vi ne forlastos nin en tiu decida momento. Por ni ĉiuj komenciĝas nova aventuro...

Tomasz Chmielik
ĉefredaktoro de '*SPEGULO*'



Letero

Bonan tagon,

Mi volas gratuli Vin pro la reorganizado de nia E-kultura vivo. Mi esperas, ke la „Spegulo” estos pli bona solvo por la nuna krizo de Esperanto. Bedaŭrinde mi ne scias, kio fariĝas... La paĝo de PEA ne funkcias jam du jarojn, falis Ĝangalo, ITV, mortis Auld, oni fermis Radion Polonia... Ĉu ni povas nun tremi? La „Spegulo” estos la gazeto tre kulturema kaj mi esperas, ke ankaŭ informacia. Mi komencas tamen dubi pri la populareco de Esperanto en Pollando tipe kiel „Tygodnik Powszechny”. La fermita grupo, kiu estas nia Esperantujo povus ja krei la grandajn portalojn interrete, organizi propagandon, komerci...

La venonta kongreso en Bjalistoko bezonas ja ne presitajn eseojn, sed la propagandan kanzonon, reklamon en la radio, televido, paĝon interretan, antaŭkongresajn konkursojn, rekomendojn de iuj famuloj... La bjalistoka „Gazeta Wyborcza” ne sufiĉas.

La dua „fronto” – nia testude aganta PEA eĉ ne proponas silenti. Mi do demandas pri la korekteco de stilo, per kiu ni volas gajni la malproksimegan celon. Ĉu ni havas ĝenerale la celon? Forigi la anglan, travivi, ĉu venki?

Mi petas ankaŭ pri la klarigo kiel apogi la „Spegulon”. La komencanta gazeto devas havi ian reklamon, ĉu ne? Mi opinias, ke la „Pola Esperantisto” kiu ne havis sian retan paĝon, ne estos por Vi la fundamento. Ja gravas ne nur la granda aŭtoritato de s. Chmielik aŭ s-ino Ligęza, sed ankaŭ la simpla kontakto.

Pozdrawiam i życzę sukcesów.

Grzegorz Słowiński

Lidia Ligeża

Stanisław Wyspiański (1869 – 1907)

En Pollando la jaron 2007 oni nomis „Jaro de Wyspiański” pro centjariĝo de lia morto. Multaj aranĝoj, teatraĵoj kaj ekspozicioj rememorigas la personecon kaj la verkon de tiu elstara artisto. Stanisław Wyspiański (1869–1907), granda reprezentanto de la pola modernismo, estis artisto multflanka. Li verkis poezion kaj dramojn, li pentris multajn, grandiozajn bildojn, projektis vitralojn (el kiu la plej fama „Dio la Patro” troviĝas en krakova, franciskana preĝejo), iome skulptis, okupiĝis pri renovado de preĝejoj polikromioj kaj vitraloj, estis aŭtoro de propraj polikromioj, projektis meblojn, tipografion de libroj kaj eldonaĵoj kaj ilin ilustris, interesiĝis pri teatro kiel aŭtoro de dekoracioj kaj kostumoj por propraj dram-verkoj.

Inter multaj, gravaj liaj dramoj specialan lokon okupas simbolisma teatraĵo „La nupto”, kies premiero okazis la 16^{an} de marto 1901, en krakova teatro. Surfone de la fama nupto de poeto Lucjan Rydel kun bela vilaĝanino el subkrakova Bronowice la aŭtoro bildigis ĉiujn esencajn problemojn de la malliberigita patrolando. Realisma tavolo de la dramo, en kiu la nuptaj gastoj kaj urbaj kaj vilaĝaj amuzas, dancas, drinkas, diskutas kaj kverelas, interplektiĝas kun vizitoj de la fantaziaj estaĵoj. Dum la nupta incito

la herooj vidas tion „kio al ĉiu en animo ludas, kion iu vidas en siaj sonĝoj”. Inter alie al knabino revenas nevivanta fianĉo, al almozulo aperas sanga fantomo de la kamparana estro de kontraŭnobela ribelo. Mastro de la nupto (kaj poste gastoj) travivas viziton de Wernyhora — verŝajne legenda, ukrainia liristo kaj profeto, kiu aŭguris al Pollando pli bonan sorton. Liaj profetaĵoj estis eĉ publikigitaj. Songo de poloj pri sendependeco ŝanĝiĝas en realon. Ĉiuj, obeemaj al mesaĝo de Wernyhora provas realigi ideon de la nacia insurekto. Kun armiloj ili atendas promesitan signalon de la ora ĉaskorno, por komenci la batalon. Sed, bedaŭrinde, ĉi-talismano estis perdita, do komencas agi la alia sorĉo. La homamaso reagas je violon-muziko de Pajlo-fasko — aŭtomate senvole dancante.

Laŭ ironia, aŭtora pintumo — Pollando revanta pri insurekto kaj libero duonsonge permesas estri super si al iela ajn manekeno el pajlo. Travivaĵoj kaj konduto de la nuptaj gastoj formas la aran psikon, kio estis absoluta novaĵo en la eŭropa dramarto. Kurtaj versoj laŭ danc-ritmoj, malglata vorta materio, ŝajna malzorgo pri versfarado donas impreson de la kruda belo kaj senpereco al tiu majstroverko.

La nupto (fragmentoj)

Dramakto I, sc. 34

- Jasiek: I Plumojn gajnis mi de l' pav',
plumojn havas mi de l' pav':
pavaj plumoj belas
pavajn plumojn ŝtelas
mi por bien-dom' del' graf',
- II Mi gajnos domon de l' graf'!
eltrenos sakon de l' hav':
mi elŝutos oron
por homa rankoro
kaj pagos plumojn de l' pav'!

Dramakto I, sc. 36

- Poeto: Vi iam ekamos kamparanon...
- Rachela: Vi eble aŭguros.
Mi favoras ege pluron,
sed necesas knabo bela.
La reveno al naturo.
- Poeto: Mi observas tiun pelon:
sed por ĉiuj la konkuro;
patro Via pri modelo
artista jam plendis; fi.
- Rachela: Ĉion li al mi permesas,
eĉ ĝojas, ke mi progresas.
Tio interesa, ne?
Ekspluato, komerc' mi — ?
- Poeto: Por Vi patr', kampuloj, ĉio
dronas en la poezio.
- Rachela: Tre multe da versaĵoj mi legis.
- Poeto: Vi verkis ie ajn?
- Rachela: Ne mi flegis
la malvolon al ĉi-tio;
kripla formo min abomenas,
sed de ĉie al mi alvenas
poezi' viva, mistera
kaj sankta
kaj mi estas feliĉa
pro ĝi viva, sincera.

Poeto: Kun sanktuloj Vi interrilatas,
 strikte kun rozoj en ĝardeno;
 strikte kun nuboj, kometoj
 kaj laŭ Via konveno
 vi volas ankaŭ kun poetoj.

Rachela: Ho, Vi per vortoj batas —
 ĉi tuta naturo mistera
 ĉesis esti por mi severa,
 tenebra.

Poeto: Nokte ardas koro
 de la fraŭlino al amoro
 kaj ŝi preferus en lok' fora
 ne sola...?

Rachela: Mi venis tie
 kie kantas la kabano,
 kvazaŭ nokta papilio
 mi flugis al lampa lumo
 — sed mi foriros sen rankoro
 hejmen
 kaj mi imagos Vin, Sinjoro
 de foro
 kaj kiam mi enamiĝos,
 sendos skribon kun ŝlosil'.

Poeto: Ĉie poezia bril',
 en kamero, koridoro,
 en roza ĝarden'
 en fruktarboj, kiuj dormas
 videblaj tra fenestreto;
 se vizitos Vi sekrete
 ilin kaj tuŝos Via ŝalo
 iun arbuston — la sopir'
 kaj trist' ampleksos ĝin viaj
 kaj arbusta ombro inspira
 ampleksos Vin senkonscie,
 fraŭlino...

Rachela: Ho, jes, ho jes...

Poeto: Kaj se kampulo aperos
 la koro konsolon vekos
 kaj pekos.

Rachela: Ho, jes, ho jes:
 tra ĝardeno mi iros
 kaj Vi en fenestro restu.

Poeto: Mi vin admiros
 vagi tra ĝarden-krepusko,

- kvazaŭ en ama embusko
 po duone knabin' kaj anĝelo
 el bildo postrafaela —
 kiam mi staros en varm'.
- Rachela: Nu, pli gravas nokta ĉarm';
 ne minacas al mi frost',
 se aromon de la roz'
 havas iu, en la pajlo
 vintron pasos,
 kaj printempe oni lin malvolvos
 kaj li mem ekfloros; —
- Poeto: Favore! —
 Vi iome koleras — ?
- Rachela: Rigardu rozon ĝardenan
 volvitan en pajlofaskon;
 antaŭ ĉi-pupo el pajlo
 mi plendos pro la herezoj
 kiujn mi aŭdis,
 pro multaj mordoj frenezaj
 mi, amanta sentas fiaskon!
 Mi invitos pajlofaskon,
 veni al la nupta dom' —
 ĝia poezi-admon'
 por Vi estos eble apreza.
- Poeto: Via nom' estas Rachela —
- Rachela: Ĉu tio ŝanĝas esencon?
- Poeto: Ho, Vi iome ruĝiĝas; —
 tamen estas diferenco —
 Vi invitu gastojn strangajn —
 Via nomo lirike vertiĝas...
- Rachela: Jes, ĝi belas — —
 kaj nun mi efektivigas
 poeziecon. —
 Por vi ĉiuj mi ĝin vekos;
 vi invitu pro la nupto
 mirindaĵojn, arbojn, florojn,
 tondrojn, zumojn kaj kolorojn...
- Poeto: Pajlopupon?!
- Rachela: Jen vi kredas?
 Al vi plaĉas ĉi-erupto:
 pajlo, rozo, nokt-agord'
 ĉi-supernatura Fort'.
- Poeto: Povas esti la nuptimpeto
 aplaŭda!

Rachela: Ha! Nun de mi la vort' laŭda.
Ĝis revido — por la momento
vi min interesis, vi – poeto.

Poeto: Vi volvas vin en la ŝalon —
do jam ĝis?!

Rachela: Ne atingos mi grandan skalon;
mi amuzas
pour passer le temps evidente.

Dramakto III, sc. 16

Poeto: Novedzino — de la songo?

Novedzino: Ha, jes, mi songis,
kvankam ne dormis,
sed en la fablo plonĝis...

Poeto: Pro la amo Novedzino malfortis.

Novedzino: — — — — —
En granda, ora kaleŝo
mi songe diablon renkontis;
mi songis stultajon tian,
implikan, galimatian.

Poeto: Kaj tuj diabla opreso,
kaj kaleŝo ora tuj ankaŭ?

Novedzino: Dum songo ja nenio stranga,
ke ia io ajn aperos;
ne moku tiun aferon,
ĉar vi povus tion ridi
kaj priklaĉi min decidi,
kvazaŭ valorus ĉi-bлаго...

Poeto: Estas tiuj, kiuj pagon
oferos por ĉi-fabeloj;
oni povas havi kabon
kaj puce vestitan diablon
kaj certigi al multaj lud-gapon.

Novedzino: Pro dancado mi fariĝis febla...
Songis mi, ke eniras la kaleŝon
kaj pezegas al mi la palpebroj;
ke sidas mi en tenebro,
tra arbaroj min veturigas diablo,
tra iaj brikaj urboj plie,
do mi demandas — „kien ni rapidas”,
kaj li diras: „al Pollando”.
Sed kie ĉi-Pollando, kie?
Vi scias?



Gimpel la Stultulo

1

Mi estas Gimpel la Stultulo. Tamen mi ne opinias min stulta. Ho, ne! Sed la homoj donis ĉi moknomon al mi. Ili komencis voki min tiel ankoraŭ en la ĥedero. Mi havis sep moknomojn, jes, sep: malsaĝulo, azeno, malspritulo, idioto, naivulo, du-poj kaj stultulo. Tiu lasta alkroĉiĝis al mi. Do, en kio konsistis mia stulteco? En tio, ke mi estas facile trompebla.

Kiam oni diris al mi: – Ĉu vi scias, Gimpel, ke la edzino de la rabeno naskis infanon? – mi ne alvenis la ĥederon. Nu, kaj montriĝis, ke tio estas mensogo. Kaj de kiu mi povis ekscii? Ĉar ŝi ne havis dikkan ventron. Ŝi havis, ne havis; mi ne gapas al la ventro de la rabenedzino. Ĉu

tio estas pruvo de mia stulteco? Sed la petoluloj ridis pri mi, henis, skrapis karon per fingroj kaj vokis: – Gimpel, pimpel, entele pentele, kaj anstataŭ rosinojn, per kiuj oni regas la gastojn de akuŝulino, ili donis al mi globetojn da kaprina merdo.

Rigardante min, oni tuj vidas, ke mi ne estas malfortulo. Se mi batus iun sur la buŝaĉon, tiu flugus al Krakovo. Tamen laŭnature mi ne estas batema: – Mi eĉ perdu – mi diras al mi. Tial ili ofte trompas min.

lun fojon, revenante hejmen el la ĥedero, mi aŭdis bojadon de hundo. Mi ne timas hundojn, sed mi ankaŭ ne dezi-



Poeto: Sur tuta mond' probable
vi povas serĉi ĝin benediktane
kaj nenie ĝin trovi.

Novedzino: Do eble ĝin serĉi vane.

Poeto: Sed estas iu kaĝo eta —
ho, Jagna, sub la mamon metu
la manon.

Novedzino: Jen faldeto
korseta, iom malglata surbruste.

Poeto: — — — Kaj tie bato?

Novedzino: Kia eduka konstato?
Koro — ! — ?

Poeto: Jen Pollando ĝuste.

Tradukis: Lidia Liĝeza

ras havi ion komunan kun ili. Povas okazi, ke iu estas rabia, kaj se ĝi mordos, eĉ ne helpos la Eternulo. Do, mi fuĝis, kaj ĉiuj sur la urboplaco tordiĝas pro rido. Ne estis la hundo, sed Volf-Lejb-ŝtelisto amuziĝis tiel... li jam ne vivas, li ripozu en... piedbatu lin ansero. Kiel mi povis ekscii? Li bojis kiel hundino.

Kiam la bubaĉoj vidis, ke mi estas tiel naiva, ĉiu volis amuziĝi pri mi:

– Gimpel, la caro venas al Frampolo!

– Gimpel, en Turobino la luno falis surteren!

– Gimpel, tiu gapulino Hodele trovis grandan trezoron apud la mikvo!

Kaj mi – kiel golemo – kredis ĉion. Unue, ĉio povas okazi, kiel estas skribite en... sed mi ne memoras, kie estas skribite kaj en kiu libro. Due: mi devis kredi. Se ĉiuj ridas pri iu, kion fari? Kiam iun fojon mi nur kuraĝis dubi pri la vereco de iliaj paroloj, tuj komenciĝis embaraso kaj ili kriegis senbride: – Ĉu vi ne kredas? Vi traktas ĉiujn judojn el Frampolo kiel mensogantojn! Do, kion fari? Mi kredis kaj esperas, ke tiuj pajacoj almenaŭ fartas bone.

Orfo mi estis. Mia avo, kiu zorgis pri mi, jam staris per unu piedo en la tombo. Mallonge dirite: oni sendis min al bakisto. Nu, eĉ ne demandu, kion ili faris tie al mi. Ĉiu knabino, ĉiu edzino, kiu venis kun kukoj por baki aŭ kiu alportis en poto nudelojn por sekigi, devis almenaŭ unufoje dupigi min.

– Gimpel, en la ĉielo estas bazaro!

– Gimpel, la rabeno naskis en la sepa monato bovidon!

– Gimpel, bovino flugis super la tegmento kaj demetis latunajn ovojn!

Alifoje vizitis min junulo, tia, kiu ĵus leviĝis de libroj en la jeŝivo, por aĉeti

freŝan bulkon, kaj subite li diras: – Ho, Gimpel, vi turnas ĉi tie ŝovelilon en la forno, kaj tie alvenis Mesio. La mortintoj releviĝis.

– Ĉu vere? – mi demandas. – Mi ne aŭdis blovadon en ŝofaron*.

– Vi estas surda! – li vokas.

Kaj la aliaj tuj krias: – Ni aŭdis, jes, ni aŭdis!

Subite eniris Rajce, kiu tordas kandelojn el vakso, kaj li vokas raŭke: – Gimpel, viaj tate kaj mame releviĝis el la tombo. Ĉie ili serĉegas vin.

Por diri la veron, mi scias, ke tion ili elsuĉis el fingro, kaj tamen... se la homoj parolas tiel... Kaj eble io okazis? Kion mi perdos, se mi rigardos? Mi ĵetis sur min kaftanon kaj rapide elkuris. Nu, kaj eksplodis tia ridego, ke ĝis nun mi ne povas trankviliĝi. Mi ĵuris al mi, ke neniam plu mi kredos tion, kion ili parolas. Ankaŭ ne estis bone. Ili konfuzis pensojn en mia kapo tiel, ke mi ne povis distingi la veron de iliaj mensogoj.

Do, mi iris al la rabeno, por konsiliĝi kun li.

Kaj li diris: – Oni skribis: prefere ĝis la vivofino estu stultulo ol aĉulo dum horo. Vi ne estas stulta, stultaj estas ili, kaj tiu, kiu humiligas najbaron surtere, perdos la vivon en la ĉielo.

Tamen la filino de la rabeno mokis pri mi. Kiam mi eliris el la ĉambro, ŝi demandis min: – Ĉu vi jam kisis muron?

Mi respondis, ke ne, ĉar kiucele?

Kaj ŝi diris: – Tio estas leĝo: kiu venas al la rabeno, tiu devas kisi muron.

Nu, tio ne malutilos al mi kaj mi kisis la pordoframon. Kaj ŝi ekridegis. Estis la bela trompo. Ankaŭ ŝi petolis kun Gimpel.

Mi jam volis forkuri en alian urbon,

sed la homoj subite frenezigiĝis por svati min. Ili kuradis post mi tiom longe kaj tiel obstine, ke ili preskaŭ deŝiris baskojn de mia kaftano. Ili muelis per siaj langoj, muelegis, ke en mia kapo zumzumis muŝo. Unu knabino jam edziniĝis foje, kaj ili persvadis min, ke ŝi estas virga. La alia estis lamanta, sed ili konvinkis min, ke ŝi iradas tiel por sin plaĉigi. Ili ankaŭ svatis por mi iun, kiu havis bastardon, sed ili diris, ke estas ŝia pli juna frato.

– Vi nur perdas tempon – mi respondis – kun ĉiesulino mi ne venos sub la ĥupon!*

Kaj ili vokis kolere: – Ho, kiel aĉe vi parolas! Ni kondukos vin al la rabeno kaj vi pagos la punon, ĉar vi senhonorigis la judan filinon.

Mi komprenis, ke mi jam ne elglitos el iliaj manaĉoj kaj pensas: Dirite-farite! Ĉar – unue – post la nupto la viro estos mi, kaj se ŝi ne malcedos al tio, mi konsentos. Due: mi ne povas ja stari ĝis la vivofino kiel paliso en barilo.

Mi iris al ŝia argildometo sur la sablo, kaj la kriaĉanta bando pelis min kiel urson. Ili tamen haltis, kiam mi venis al la puto. Ili timis kolerigi Elkan. Ĉiuj konis ŝian pikan langon, kaj kiam ŝi malbridis ĝin, ŝia buŝo ne povis fermiĝi kiel pordo sur unu ĉarniro.

Mi eniris la kabanon. De muro al muro pendis la ŝnuroj, sur kiuj sekiĝis lavaĵo, kaj ŝi staris nudpiede ĉe la kuvo. Vestita per malnova, fustena robo. Ŝi havis du harliĝetojn, kiujn ŝi volvis – kiel ŝikso – ĉirkaŭ la oreloj. Sufokis min odoraĉo reganta en la ĉambreto.

Estis ja evidente, ke Elke scias, kiucele mi venis, ĉar ŝi rigardis min kaj diris:

– Kiun mi vidas? Vi aperis, ci dupo!

Kaptu tabureton kaj sidiĝu!

Mi rakontis ĉion, kion mi aŭdis pri ŝi, kaj demandis: – Ĉu vi ankoraŭ estas virga kaj ĉu tiu malgranda bubaĉo Jehjel estas via pli juna frato? Bonvolu ne moki pri mi, ĉar mi estas orfa.

– Mi ankaŭ estas orfa – ŝi respondis – Sur mia lango elkresku pipso, se iu volas turni pensojn en via kapo. Sed ili ne imagu, ke mi estas facile trompebla. Mi deziras ricevi – ŝi diris – kvindek guldenojn dote kaj nupto-monon de la komunumo. Kaj se ili ne konsentos, do ili kisu min – vi scias – sur kion... (Ofte ŝi aŭdigis malbelajn vortojn).

Mi diris: – La doton ja donas fianĉino, kaj ne fianĉo. Tiam ŝi respondis mallonge:

– Ne marĉandu kun mi; se jes, estu jes; se ne, estu ne kaj for de ĉi tie.

Mi jam pensis, ke el tiu faruno ili neniam bakos panon. Se tamen estas necese, la homoj trovos monon. Nia urbe to estas riĉeta. Kvankam tiutempe disenterio faligis multajn loĝantojn, ili kolektis tiom, kiom ŝi postulis kaj okazis la nupto. Ho, kia nupto estis! pli bone mi ne rakontu: la ĥupon oni starigis antaŭ la pordego de la tombejo, proksime al la dometo, kie oni lavas kadavrojn. La gastoj ebriiĝis. Kiam oni skribis la nupto-kontrakton, mi aŭdis, ke la dajano* demandis:

– Ĉu la fianĉino estas eks-edzino aŭ vidvino?

– Ŝi estas eks-edzino kaj vidvino samtempe – haste respondis la edzino de la ŝameso*.

Nigraj flokoj kirliĝis antaŭ miaj okuloj, sed kion mi povis fari – ĉu mi fuĝu de la ĥupo?

La gastoj dancis kaj kantis, kaj iu mal-

junulino ridaĉante donis al mi la blankan nuptokukon. La badĥano* aŭdigis la funebran preĝon je la mortintaj gepatroj de la nova edzino. Knaboj ĵetis urtikojn kiel dum la fastotago de Tiŝebov*.

Oni alportis por ni multajn donacojn: knedujon, sitelon, balailojn, pastujon, kuleregojn kaj aliajn objektojn por mastrumado hejme. Mi rigardas, kaj du fortikaj knaboj portas lulilon.

– Kiucele? – mi demandis.

– Ne rompu al vi la kapon – ili respondis. – Tiel devus esti. Vi bezonos ĝin.

Iom post iom mi komprenis, ke mi fordonis anseron kaj ricevis paseron. Se tamen konsideri ĉion aliflanke, kion mi perdos? Cetere – mi atendos dum kelka tempo kaj vidos, kio okazos. Ne povas esti tiel, ke la tuta urbeto freneziĝis.

2

Nokte mi venis al mia edzino, kaj ŝi ne enlasis min en la liton.

– Kial ne? – mi demandis – tiucele mi ja edziĝis kun vi.

Kaj ŝi respondis: – Mi fariĝis nekoŝera.

– Nekoŝera? Hieraŭ oni kondukis vin kun muziko al la bano en la mikvo.

Kaj ŝi diris: – Hodiaŭ ne estas hieraŭ, kaj hieraŭ ne estas hodiaŭ. Se tio ne plaĉas al vi, enpaku viajn aĵojn kaj for de ĉi tie!

Mallonge dirite – mi atendis.

Nu, kaj mi ĝisatendis!

Ne pasis kvar monatoj, kaj mia Elke naskas. Ĉiuj loĝantoj de Frampolo ridis antaŭ mia nazo, sed kion mi faru? Ŝi tordiĝis pro doloro, gratis per siaj ungoj la muron.

Gimpel! – ŝi vokis. – Mi jam mortas,

pardonu min!

Nian kabanon plenigis virinoj. Ili alportis potojn da bolanta akvo, kaj ŝi kriegis terure. Mi kuris al la sinagogo kaj ekpreĝis psalmojn.

Sed fiuloj jam atendis min tie. Mi staras en la angulo, preĝas al la Eternulo, kaj ili mokas: – Preĝu, preĝu, tio ne grave vigas virinojn.

Iu bubaĉo etendis la manon kun fojno al mia buŝo: – Manĝu, manĝu – li diris – ŝafoj tion ŝatas.

Ho, mia Dio! Mi konfesas, ke la bubaĉo pravis.

Feliĉe ŝi naskis knabon. Vendrede vespere en la sinagogo la ŝameso grimpis sur la bimon*, pugnobatis la tablon kaj diskonigis la novaĵon: – Tre prospera rebo Gimpel invitas ĉiujn al la festeno okaze de la naskiĝo de sia filo.

Ĉiuj homoj en la sinagogo eksplodis per ridego. Mi sentis min tiel, kvazaŭ iu kraĉus al mi sur la vizaĝon. Sed kion mi povis fari? Tio estis mia devo por aranĝi la solenaĵon.

Kunvenis duono de la loĝantoj el la urbeto. Mia kabano estis ŝtopita. Virinoj alportis pizojn kun pipro, kaj el la gastejo iu alportis barelon da biero. Mi manĝis kaj trinkis kiel aliaj. La gastoj deziris al mi feliĉon kaj prosperon. Kiam okazis la briso (*), mi donis al la knabeto la nomon de mia patro, li ripozu en paco. Kiam ĉiuj disiris, mi restis kun mia edzino. Ŝi elŝovis la kapon el malantaŭ la kurteno ĉe la lito kaj vokis, ke mi alproksimiĝu.

– Gimpel – ŝi demandis – kial vi silentas? Ĉu vi forgesis langon en la buŝo?

– Nu, kion mi parolu – mi respondis – bele vi mokis pri mi! Se mia panjo ekvidus tion, ŝi mortus ankoraŭfoje.

Ŝi diris: – Ĉu vi freneziĝis?

– Mi ne estas frenezulo – mi respon-
dis – sed kial antaŭ ĉiuj homoj vi dupigis
min, kiu devus esti via mastro kaj sinjo-
ro?

– Kio okazas pri vi? – ŝi demandis –
Kiu muŝo zumas en via kapaĉo?

Mi komprenis, ke mi devus elfleti el mi
ĉion, kio premezas al mi la hepaton, tial
mi diris:

– Ĉu vi pensas, ke tiel oni traktas la
orfon? Vi naskis bastardon.

Ŝi diris: – Elbatu tiujn stultaĵojn el la
kapaĉo! La infano estas via.

– Ĉu povas esti mia infano, se li
naskiĝis nur deksep semajnojn post la
nupto?

Kaj ŝi komencis persvadi min, ke la in-
fano estas sepmonata. Sep monatoj ne
estas kvin monatoj. Tiam ŝi rakontis al
mi, ke ŝi havis avinon, kiu neniam estis
graveda pli longe ol kvin monatojn. Kaj
ŝi, Elke, similas la avinon, kiel du akvoguo-
toj. Ŝi ĵuris por ĉiuj sanktaĵoj, ke tio es-
tas vero. Se gojo alparolus min sur la ba-
zaro per tiaj vortoj, certe mi kredus lin.
Tamen por diri sincere, eĉ ne iomete mi
kredis ŝin. La sekvan tagon mi interparol-
is pri tio kun melamedo. Eble la instru-
isto – mi pensis – klarigos ion al mi. Li di-
ris, ke la samo okazis al Adamo kaj Eva.
Ili eniris la liton duope, kaj vekigis kva-
rope. Nu, ĉiu virino en la mondo – li finis
– estas pranepino de la prapatrino Eva.
Ĉu via Elke estas pli malbona ol la pra-
patrino de la homa gento? Li tamen kon-
fuzis pensojn en mia kapo. Ĉu oni scias
ĉion; homoj diras, ke la malgranda Je-
suo ankaŭ ne havis patron.

Iom post iom mi forgesis la tutan
malfeliĉon. Mi tre ekŝatis la knabeton.
Li ankaŭ ekŝatis min. Kiomfoje li nur vi-
dis min, li etendis ambaŭ manetojn, por

ke mi prenu lin sur la brakon. Kiam li
ploreteis aŭ sufokiĝis de plorego – nur
mi povis trankviligi lin. Mi aĉetis por li
ostan ringeton kaj ĉapeton broditan
orfadene. Ĉiutage iu ĵetis aĉan rigardon
sur lin, kaj mi kuregis por alporti diver-
sajn amuletojn kontraŭ malbona sorĉo.

Tiutempe mi laboregis kiel bovo.
Kiam malgranda infano estas hejme, la
familio bezonas multe da mono.

Sincere mi konfesos: mi ne povas di-
ri, ke mi sentis malamon por Elke. Kvan-
kam ŝi malbenis kaj insultis min terure,
mi estis preta forviŝi polvon antaŭ ŝiaj
piedoj. Tiu virino regadis super mi! De
tempo al tempo ŝi rigardis min per unu
okuleto tiel, ke mi rigidigis. Kaj kiam ŝi
malfermis la dolĉan buŝeton, ĝi kraĉis
fajron kaj sulfuron, sed ofte ŝi estis por
mi tiel ĉarma, ke mi kiskus ĉiun vorton,
kiun ŝi diris. Sed tuj poste ŝi pikis min
fortege sub la sepan ripon, en miajn
vundojn ŝi enŝutis salon, kaj mi estas
ravita.

Ĉiuvespere krom du buloj da blanka
kaj nigra pano mi alportadis bulkojn kun
papavo, kiujn mi bakis. Ankaŭ por ŝi mi
fariĝis ŝtelisto. Ho, jes! Mi ŝtelis ĉion, kio
falas al mi en la manojn: peceton da ku-
ko, nudelojn, tie mi elprenis rosineton,
kaj aliloke – migdaleton. Mi hontas di-
ri: se mi nur povis, mi ŝtelis el la potoj,
kiujn antaŭ la sabatmanĝo la virinoj por-
tadis al la bakejo, por varmigi en la for-
no. Mi elprenis pecojn da viando, iom
da ĉulento*, kokinan piedeton aŭ kape-
ton, farĉitan koleton. Ŝi manĝadis ĉion
kaj fariĝis dika, pli kaj pli bela. Dum la tu-
ta semajno mi ne pasigis noktojn hejme,
nur vendrede vespere mi venadis al El-
ke, sed ĉiam ŝi elturniĝis. Io premis al ŝi
la stomakon aŭ io pikis ŝin en la flanko,

aŭ turmentis ŝin hikado, aŭ doloro kreviĝis al ŝi la kapon.

Nu, ĉiu konas la virinajn artifikojn! Mi estis furioza. Por kompletigi la malfeliĉon, ŝia frato, tiu bastardo, kreskis kaj batis min. Kaj kiam mi volis bati lin, Elke malfermis la buŝaĉon kaj kriegis tiel, ke antaŭ miaj okuloj kirligis nigraj flokoj. Dek fojojn ĉiutage ŝi timiĝis min per divorco. Alia viro jam delonge forkurus tien, kie pipro kreskas, sed mi estas cedema. Nu, kion mi povus fari? Verŝajne la Eternulo donis al la homoj la dorson, ke li portadu kun peno siajn zorgojn.

Iun nokton okazis malfeliĉo. Krevis la forno, sed la bakejo ne forbrulis. Estis nenio por fari, do mi iris hejmen. Almenaŭ foje – mi ekpensis – mi dormos kun ĝuo meze de la semajno, en la propra lito. Mi timis, ke mi vekos la malgrandulon, do mi eniris sur la piedfingroj en la kabanon. Mi haltis sursojle kaj orekaptis kvazaŭ duoblan ronkadon. Iu ronkas kante, kaj la alia kiel buĉata bovo. Tio ne plaĉis al mi. Ho, ne! Mi iras al la lito, kaj sub miaj piedoj tremegis la tero: apud Elke kuŝas viro. Iu kriegus tiel laŭte, ke alkurus ĉiuj loĝantoj de la urbe-to. Sed mi ekpensis, ke mi povus veki la infanon? Kial mi terurigu la etulon? Nu, bone... Mi revenis al la bakejo kaj kuŝiĝis sur la sakon da faruno. Ĝis mateno mi ne fermetis la okulon. Mi tremegis kiel en febro. Jam sufiĉos – mi ekpensis. – Ĉu ankoraŭ longe mi estu tia azeno? Nnnu, Gimpel ne permesos enŝovi fremdan nazon en la propran vazon. Eĉ por tia dupo kiel Gimpel la stulteco havas limojn.

Matene mi iris al la rabeno por interkonsiliĝi. Tuj li sendis la ŝameson, ke li venigu Elkan. Tra la urbeto aŭdiĝis

granda tumulto. Mia edzino aperis kun la knabeto surbrake kaj ĉion mensogis al la rabeno. Ŝi parolis tiajn mensogojn, ke la muroj krakis.

– Li estas freneza – ŝi kriegis – mi ne scias, pri kio li sonĝis aŭ kion li imagis!

Ĉiuj, kiuj venis, admonis ŝin, avertis, ili eĉ pugnobatis la tablon, sed Elke ne obeis.

– Tio estas aĉa kalumnio! – ŝi vokis.

Elkan subtenis ĉevalovendistoj kaj buĉistoj, kaj iu knabo el la buĉejo rigardis en la ĉambron kaj diris al mi: – Gimpel, ni observas vin. Vi estos batita.

Dume la knabeto ekploregis, Elke devis ŝanĝi vindaĵojn. Ĉar en la rabena ĉambro troviĝis la Hakodeŝo* kun Sanktaj Rulaĵoj, iu ordonis al ŝi eliri.

– Rabeno – mi demandis – kion mi faru?

Li respondis: – Vi devos tuj eksedziĝi.

– Kaj se ŝi ne konsentos pri la divorco? – mi demandis.

– Vi donos al ŝi la divorcan leteron. Poste vi estos libera.

– Nu, bone, rabeno, mi konsideros tion...

– Eĉ ne estas konsiderinde – respondis la rabeno – vi ne povas vivi kun ŝi en unu domo.

– Kaj se mi dezirus vidi la knabeton? – mi demandis.

– Forlasu ĉi putinon kun bastardo.

Kaj la rabeno prezentis sian verdikton, ke mi ne povas eĉ trapasi la sojlon en la domo. Neniam. Ĝis la fino de mia vivo. Dumtage mi eltenis iel. Nu – mi pensis – la absceso krevis. Sed nokte, kiam mi kuŝis sur la sakoj, mi sentis grandan malĝojon. Mi sopiris Elkan kaj la knabeton. Mi volis furioziĝi, sed mi ne povis. Ĝuste tio estas malfeliĉo, ke mi ne povas

senti koleron. Mi volis klarigi tion al mi: unue, la homo ne ĉiam kondutas saĝe en la vivo... Certe tiu aĉulo delogis ŝin, eble li donacis al ŝi ion, kaj la virino – ĉiuj scias – havas longajn harojn, sed pensojn mallongajn. Ŝi lasis kapti sin. Due, se ŝi parolas tiel obstine – eble nur mi imagis ĉion? Okazas, ke antaŭ la okuloj aperas ia figuro, kaj se alproksimiĝi, neniue estas videbla. Do, mi estis maljusta kontraŭ Elke – mi pensis – kaj esploris. Mi ploregis tiel, ke malsekiĝis faruno en la sako, sur kiu mi kuŝis.

La sekvan tagon matene mi iris al la rabeno kaj diris, ke mi eraras. Li rigardis min, skribis miajn vortojn per ansera plumo kaj respondis, ke li transdonos ĉi tiun peton al la aliaj rabenoj, por ke ankoraŭfoje ili juĝu tion, kio okazis. Li avertis min, ke ĝis kiam venos ilia respondo, mi ne povas alproksimiĝi al mia edzino. Sed li permesas sendi homon kun pano kaj mono por ŝi.

3

Pasis naŭ monatoj, antaŭ ol ĉiuj rabenoj interkonsentis. Iliaj leteroj migradis senĉese. Mi ne imagis, ke tiom longe ili devos okupiĝi pri mia afero, ke ĝi postulas tian grandan saĝon.

Dume Elke naskis ankoraŭ unu infanon. Ĉifoje estis knabineto. Sabate en la sinagogo mi preĝis je la prospero de la akuŝulino. Oni vokis min solene al la bimo, ke mi tralegu benojn el la Torao kaj donu al la knabineto la nomon de mia bopatrino, ŝi ripozu en paco.

La tuta Frampolo amuziĝis pri mia hontego. Petoluloj kaj klaĉuloj, venantaj al la bakejo, havis multe por mueleĝi per siaj aĉaj langoj. Sed mi ne aŭskultis.

De nun mi tamen decidis, ke mi kredos ĉion, kion parolas aliaj. Ĉar ne estas bone, se la homo ne kredas. Hodiaŭ li ne kredas sian edzinon, kaj morgaŭ li ne kredos Dion.

Ĉiutage mi sendadis kun helpo de la submajstro, loĝanta najbare al Elke, bulon da sekala aŭ tritika pano, aŭ kukopecon, aŭ bulkon, aŭ kelkajn bajglojn, aŭ iomete da kugelo*, kaj se mi havis okazon, ankaŭ pecon da miela kuko aŭ edziĝifesta strudelo – ion ajn, kio falis en miajn manojn. La submajstro estis knabo kun bona koro; ofte li aldonis ion propravole. Antaŭ longe li furioziĝis pro mi, enbatis kubuton sub miajn ripojn, tiris min je la nazo, sed de kiam li vizitadis Elkan, li ŝanĝiĝis nerekoneble kaj traktis min amike.

– He, Gimpel – li alparolis min foje – vi havas tre bonan edzinon kaj du agrablajn infanojn. Dio pardonu min, sed vi ne meritas ĉi tian familion.

– Kaj ĉu vi scias – mi demandis lin – kion la homoj parolas pri ŝi?

– La homoj havas aĉajn langojn kaj ŝatas mueleĝi – li respondis – ĉagreniĝu pri iliaj vortoj kiel pri neĝo de la pasinta vintro.

Ĉiutage la rabeno vokis min kaj demandis:

– Ĉu vi estas certa, Gimpel, ke vi faris eraron?

– Jes, rabeno – mi respondis.

– Ĉu vere – li diris – vi ja vidis.

– Ŝajne estis ombro.

– Ombro – li ripetis – de kio?

Kaj mi klarigis:

– La ombro de trabo.

– Nu – li diris – vi povas reveni hejmen. Vi ŝuldas tion al la rabeno el Janovo. Li elfosis el la libroj de Majmonido la forgesi-

tan juĝon, kiu estas nun favora al vi.

Mi kaptis la manon de la rabeno kaj kisis ĝin.

Mi volis tuj kuri hejmen. Ne mirinde – tiom longe mi ne vidis mian edzinon kaj la knabeton. Poste mi ekpensis, ke pli bone mi iru al laboro, kaj nur vespere mi rehejmiĝu. Al neniu mi diris eĉ vorton, sed mia koro estis ĝoja kiel pro granda festo. La virinoj ridis kaj mokis pri mi kiel kutime, sed mi tute ne ĉagreniĝis – babilu, kion salivo alportos sur vian langon. La vero samkiel olivo aperas supre. Se Majmonido skribis, ke „koŝera”, tio signifas „koŝera”.

Vespere, kiam mi kovris paston, ke ĝi kresku, mi prenis panon, ŝutis blankan farunon en malgrandan sakon kaj iris hejmen. Estis la vintro, kuŝis freŝa neĝo. Alte brilis la plenluno, kaj en la ĉielo flugis steloj. Mi paŝis vigle kaj antaŭ mi kuris longa ombro. Mi volis kanti, sed mi povus vekti mastrojn en tiu malfrua horo. Mi volis iom fajfi, sed mi tuj rememoris, ke nokte estas malpermesite, ĉar tio povus allogi demonojn. Do, mi silentiĝis kaj iris per longaj paŝoj.

En la bienetoj de gojoj hurlis kolere hundoj, kaj mi pensas: Elfalu viaj dentoj pro tiu bojado! Vi restos nur bestoj, kaj mi estas homo, edzo de la honesta virino, patro de la kapablaj infanoj.

Mi proksimiĝis al la kabano, kaj mia koro martelegis kvazaŭ ĉe ŝtelisto. Mi ne sentis timon, sed ĝi batadis: pum-pum-pum... nu, mi devos eniri. Sen knaro mi malfermis la pordon kaj eniris. Elke jam dormas. La ŝutoj – fermitaj, sed tra fendoj penetras lunobriilo. Mi haltis kaj rigardas en la lulilon, mi vidas la vizaĝeton de la knabinjo kaj tuj sentas, ke mi ekamis ŝin! Ĉiun osteton.

Poste mi alproksimiĝis al la lito. Sed kiun mi vidas? La submajstron kuŝi apud Elke! Subite estingiĝis la lunobriilo. Antaŭ miaj okuloj haste kirligiĝis nigraj flokoj, tremegiĝis al mi la manoj kaj piedoj. Mi ellasis la panobulon. Elke vekigiĝis kaj demandas: – Ho, kiu estas ĉi tie?

– Mi – responde aŭdiĝis mia balbuto.

– Gimpel? – ŝi demandis. – De kie vi alvenis? Oni ja malpermesis al vi la vizitojn ĉe mi?

– La rabeno permesis – mi respondis, tremegante kiel en febro.

– Aŭskultu min, Gimpel – ŝi diris – iru al la budo kaj vidu, kio okazas pri nia kaprino. Ŝajnas al mi, ke ĝi estas malsana.

Mi forgesis diri, ke ni havas kaprinon. Kiam mi aŭdis, ke ĝi estas malsana, mi iris sur la korton. Ĝi estis agrabla besteto. Tiel proksima al mi kiel homo.

Ŝanceliĝante mi iris tien kaj malfermis la pordon. La kaprino staras sur kvar piedoj. Mi palpis ĝin maldekstre, dekstre, ektiris ĝiajn kornojn, tuŝis la mamojn. Mi trovis nenion malbonan. Ŝajne ĝi manĝis tro multe da arboŝelo – mi ekpensis.

– Bonan nokton, kaprineto – mi diris – Estu sana!

Kaj tiu malgranda besto mekis responde, kvazaŭ ĝi volus danki por miaj vortoj.

Mi revenis hejmen kaj vidas, ke la submajstro forvapiĝis.

– Kie li estas... – mi demandis – kie estas tiu knabo?

– Kiu knabo? – respondis mia edzino demande.

– Nu, la submajstro, kun kiu vi dormis.

– Ho, malfeliĉoj frakasu vin – kriegis mia edzino – ĉiuj egiptaj plagoj falu al vi

sur la kapaĉon, doloroj tordu vian karnon kaj animon!

Kaj subite el malantaŭ la forno elsaltis ŝia kvazaŭ-frato kaj tiel forte pugnobatis min sur la nukon, ke preskaŭ rompiĝis mia spino. Ci, monstro! – ton-drin Elke. – Ci, kreteno! Aĉulo! Ci, dupo! Ŝajne dibuko ekposedis vin kaj blindiĝis al vi la okulojn. For el mia domo aŭ mi kriegos tiel, ke ĉiuj en Frampolo elsaltos el siaj litoj!

„Ŝajne – mi ekpensis – muŝo zumas al mi en la kapo”, kaj tuj poste mi diris: – Ne faru tiom da bruo. Ĉu la homoj akuzu min, ke mi venigas demonojn kaj dibukojn? Tiam neniu tuŝos mian panon.

Mallonge dirite: iom mi trankviligis ŝin.

– Nu, jam sufiĉos por hodiaŭ – ŝi diris – enlitiĝu kaj batu vin fulmo!

Matene mi vokis la submajstron kaj diris:

– Aŭskultu, fraĉjo! – kaj poste tra la buŝo mi elĵetis ĉion, kio premeĝis al mi la koron.

Li rigardis min tiel, kvazaŭ mi estus falinta de la luno.

– Kion vi babilas? Mi estas sana – li respondis – sed vi devos viziti herbokuraciston aŭ barbiron. Mi timas, ke klapo mankas en via kapo. Sed mi pardonos vin kaj diros al neniu eĉ vorton. Mi fermos la buŝon.

Kaj okazis tiel.

Mi ne rakontos longe; do mi nur diros, ke mi pasigis kun mia edzino preskaŭ dudek jarojn. Ŝi naskis al mi ses infanojn: kvar knabinojn kaj du knabojn. Okazis diversaĵoj, sed mi vidis nenion kaj nenion aŭdis. Mi kredis kaj la fino. Iam la rabeno diris al mi: – Bone al tiu, kiu kredas. Estas ja skribite: la justulo vivas per

sia kredo.

Subite mia edzino malsaniĝis. En la komenco estis bagatelo: malgranda tumoro sur la mammo. Sed bedaŭrinde ne estis destinite al ŝi vivi pli longe. Mi perdis amason da mono. Mi forgesis diri, ke tiam mi estis posedanto de la bakejo, kaj en Frampolo mi fariĝis riĉulo. Ĉiutage vizitadis ŝin la kuracisto. Kaj se iu virino en la ĉirkaŭaĵo kuracis per herboj, mi tuj vokis ŝin. Ili forpelis de ŝi malbonajn sorĉojn, metis hirudojn kaj kupojn. Mi veturigis eĉ doktoron el Lublino, sed jam estis tro malfrue.

Antaŭ la morto ŝi vokis min al la lito kaj diris: – Kara Gimpel, pardonu min!

Kaj mi respondis: – Kion mi pardonu? Vi estis fidela edzino.

Tiam ŝi diris: – Ho, ve al mi, Gimpel! Mi mensogis aĉe dum tiuj pasintaj jaroj. Sed mi volas liberigi min de la pekoj, antaŭ ol mi iros al la Eternulo. Mi devas konfesi, ke la infanoj ne estas viaj.

Kvazaŭ iu bategus min per bastono sur la kapon. – Kies ili estas? – mi tuj demandis.

– Mi ne scias – ŝi respondis – multe da viroj dormis kun mi, sed la infanoj ne estas viaj.

Kiam ŝi diris ĉi vortojn, ŝia kapo falis de la kuseno, kaj la okulojn kovris nebulo kaj Elke forpasis. Sur la palaj lipoj restis nur rideto.

Ŝajnis al mi, ke ŝi ankoraŭ parolas: „Mi trompis Gimpelon – jen la senco de mia mallonga vivo!”

4

lun nokton, post sep funebraj tagoj, mi endormiĝis sur la sakoj kun faruno, kaj subite aperis diablo kaj alpa-

rolis min:

– Gimpel, kial vi dormas?

Kaj mi respondis:

– Kion mi faru? Ĉu mi manĝu pirogojn?

Li diris:

– Se la tuta mondo trompas vin, trompu la tutan mondon.

Mi demandis:

– Kiel mi povus trompi la tutan mondon?

– Dumtage pisu en la sitelon, kaj nokte verŝu ĉion en la paston. Kaj tiuj Frampolaj saĝuloj manĝu vian pisaĵon.

– Kio okazos, se mi estos juĝita en la transa mondo? – mi demandis

– Ekzistas neniu transa mondo – li respondis. – Oni persvadis ĝin al vi kiel katon en sako. Estas nura trompo.

– Kaj Dio?

Li diris:

– Ankaŭ Dio ne ekzistas.

Mi demandis:

– Kaj kio estas?

– Nur profunda marĉo – li respondis.

Li ankoraŭ restis staranta antaŭ miaj okuloj: kun kapra barbeto kaj kornoj, kun longaj dentoj kaj vosto. Aŭdante ĉi vortojn, mi volis kapti ĝin je la vosto, sed mi ruliĝis de la sakoj kaj preskaŭ rompis al mi ripojn. Pro urĝa pisemo mi devis eliri, sed hazarde mia rigardo falis sur la knedujon kun jam ŝvelinta pasto, kiu petis min: faru tion. Mallonge dirite: mi lasis tenti min.

Matene venis mia helpanto. Ni formis bulojn, superŝutis ilin per kumeno kaj – en la fornjon. Li iris hejmen, kaj mi sidiĝis oportune kaj pensas: – Nu, kaj vi venĝis, Gimpel, pro ĉiuj humiligoj. Ekstere brilis frosta neĝo, sed ĉe la forno estis varme. Pro flamoj mi havis la ardantan vizaĝon.

Mia kapo falis sur la bruston kaj mi ekdormetis.

En sonĝo tuj aperis Elke, volvita per mortotuko, kaj ŝi vokis:

– Gimpel, kion vi faris?

– Vi kulpas pri ĉio – mi diris – kaj ekploris.

– Stultulo – kriis Elke – ĉu vi pensas, ke se mi mensogis, do la tuta mondo ankaŭ estas mensogema? Mi trompis nur min. Kaj nun mi pentas tion, Gimpel! Ĉi tie nenio estos pardonita al mi.

Mi rigardis ŝian vizaĝon. Ĝi estis nigra kiel peĉo. Mi vekigis. Longe mi sidis rigida. Mi sentis, ke mia vivo perdis ekvilibron kaj ekpendis sur hareto. Ankoraŭ momento – kaj mi ne trovos lokon por mi en la transa mondo. Sed la Eternulo helpis min. Mi kaptis ŝovelilon kaj elĵetis panbulojn el la forno. Mi portis ĉion sur la korton kaj fosis kavon en la frosta tero.

Dume revenis mia helpanto:

– Kion vi faras, majstro? – li demandis pala kiel kadavro.

– Mi scias, kion mi faras – mi respondis kaj enfosis ĉiujn panbulojn antaŭ liaj okuloj.

Poste mi kuregis hejmen, elprenis el la kaŝejo la ŝparitan monon kaj disdonis al miaj infanoj.

– En la hodiaŭa nokto – mi diris – via patrino aperis por mi sonĝe. Ho ve al ŝi, kompatinda! Ŝi jam nigriĝas.

La infanoj terurigiĝis kaj ne povis diri eĉ vorton.

– Estu sanaj – mi diris – kaj forgesu, ke iam ajn ekzistis Gimpel.

Mi surmetis kaftanon kaj botojn, mi kaptis saketon kun taleso* per unu, kaj bastonon – per la alia mano, mi kisis por adiaŭo la mezuzon*, alnajlitan al la po-

rdoframo.

Ĉiuj, kiujn mi renkontis sur la vojo, mi-regis.

– Kien vi iras? – ili demandis, kaj mi respondis: – En la mondon mi iras, en la mondon.

Tiel mi forlasis la urbeton Frampolo.

Mi migris tra la tuta lando, kaj bonaj homoj zorgis pri mi. Pasis jaroj. Mi fariĝis maljuna, kaj miaj haroj estas grizaj. Mi aŭskultis multajn fabelojn, amason da mensogoj kaj elpensitaj historioj. Sed ju pli longe mi vivas, des pli firme mi konvinkigigas, ke ĝuste ne estas trompoj. Se io ne okazos al unu, do al la alia homo, se ne hodiaŭ, do morgaŭ, post unu jaro aŭ cent jarojn poste. Estas neniam diferenco! Oni rakontis al mi ofte diversajn historiojn, kaj mi parolis: „Ne estas ja eble! Tio ne povis okazi!”. Sed antaŭ ol pasis unu jaro, mi aŭdis, ke en iu loko okazis ĝuste tiel!

Migrante de loko al loko, sidante ĉe fremdaj tabloj, ofte mi rakontas elpensitajn historiojn: pri diabloj, luphomo, sorĉisto, pri ventmuelejo kun fantomoj kaj – mi ne scias, ankoraŭ pri kio. Infanoj kuras post mi: – Aĉjo, rakontu fabelon! Ili petas, kion ili volus aŭskulti, kaj mi rakontas. Ili estu kontentaj. Iam knabeto diris al mi: – Aĉjo, vi rakontas ĉiam denove la saman fabelon. Kaj pravis tiu malgranda ŝejgeco*.

Same okazas pri miaj sonĝoj. Tiom da jaroj pasis, de kiam mi forlasis Frampolon, kaj apenaŭ mi fermas la okulojn, mi revenas tien. Kaj kiun mi vidas? Elkan. Ŝi staras ĉe la kuvo kun lavaĵo, kiel en la tago de nia unua renkontiĝo, sed la vizaĝo estas hela, ŝiaj okuloj brilas kaj ardas kiel ĉe anĝelo. Ŝi alparolas min per strangaj vortoj en fremda lingvo. Post

la vekigo mi memoras nenion, sed kiam mi sonĝas, mi sentas min feliĉa. Elke respondas ĉiujn miajn demandojn kaj tio, kio ŝajnis al mi dubinda, estas nun klara kaj prava. Mi ploras kaj petegas: – Lasu min veni al vi – kaj ŝi diras konsole: – Estu pacienca, Gimpel! Via lasta horo estas pli proksime ol vi imagas. De tempo al tempo ŝi glatigas miajn harojn per mano kaj kisas min; larmogutoj falas sur mian vizaĝon. Kiam mi vekigigas, mi sentas tuŝon de ŝiaj lipoj kaj salan guston de ŝiaj larmoj.

La nuna mondo estas kreaĵo de la homa imagokapablo, sed apenaŭ iomete ĝi diferencigigas de la vera mondo. Ĉe la pordo de la kadukulejo, kie mi kuŝas, oni starigis la tabulon, sur kiu oni portas mortintojn. Kaj ĉiam preta estas la fosilo de la tombisto. Mia tombo atendas. Vermoj malsatas. La mortotukon mi jam kudrigis por mi kaj tenas ĝin en mia sako. Alia mizerulo jam rigardas, ke mi forlasu tiun pajlofaskon. Se venos la lasta horo, mi forpasos kun ĝojo. Ĉio, kion mi vidos tie, estas vero, sen zorgoj, sen morkoj, sen trompoj. Gloron al Dio: tie neniu faros el Gimpel stultulon.

Notoj

Aron-ha-kodeŝo (el la hebrea: „sankta kasto”, ankaŭ hejĥalo, tevo) – ŝranko kun sefer-Tora (Tora-rulaĵo). Ĝi troviĝas sur tiu muro de la sinagogo, kiu montras direkton al Jerusalemo. Dum la preĝoj la judoj turnas sin al Jerusalemo, kaj la aron-ha-kodeŝo estas ĉefa objekto. Supre flamas la eterna lampo (ner-tamid). La aron-ha-kodeŝo estas kaŝita malantaŭ la vualo (paroĥeto), kaj la pordeton oni malfermas elprenante la sefer-Toraon aŭ okaze de la precipe gravaj preĝoj, kiam pro respekto antaŭ la Tora ĉiuj ekstaras. La pordeto estas belege skulptita kaj ornamita. El la ornamaĵoj plej ŝatata motivo estis leono.

Av – (la 5^a lun-monato de la hebrea kalendaro, se kalkuli de Nisan, monato de la Eliro, aŭ la 11^a, se kalkuli de la Novjara Festo (Roŝ Haŝone). Ĝi komenciĝas en julio aŭ komence de aŭgusto, kaj ĝia Zodiaksigno estas Leono. Av estas plej malĝoja monato de la jaro, en kiu okazis la detruo de la Unua kaj Dua Temploj, kion memorigas fastado en la Naŭa tago de Av. Do, „Kiam Av komenciĝas, pli malforta estas la ĝojo”. Tamen la Dekkvina tago de Av iam estis festo. ⇨ Tiŝe-Bov (la Naŭa tago de Av, el la hebrea: tiŝa be-av) – la plej malĝoja tago de la juda jaro, kion distingas fastado, kiu memorigas la detruon de la Unua kaj Dua Temploj en Jerusalemo. Krom la tagnokta fastado deviga estas ankaŭ la parta funebro. La judoj ne portas ledajn ŝuojn, ne sidiĝas sur la seĝojn antaŭtagmeze, kaj la tefilenojn ili surmetas nur por la miŝno (posttagmezaj preĝoj). Oni malpermesas lavi al si la korpon kaj studi la Toraon, kio alportas grandan ĝojon. Kaj laŭ la kutimo – dormi sur io pli malmola, iuj judoj metas eĉ ŝtonon sub la kapon anstataŭ kusenon. En la Mesia tempo la Naŭa tago de Av estos ĝoja festo, sed kiu ne ploris pri la detruo de la Templo, tiu ne ricevos Difavoron por ekvidi ĝin rekonstruita. La judoj parolas rekte, ke Mesio naskiĝis en tiu ĉi tago, kiam oni detruis la Templon, tial la detruo jam enhavas grajnon de la redempto. Preĝoj en la sinagogo okazas ĉe malbrila lumo, oni legas Lamentojn kaj ĉantas specialajn himnojn (kinot) kun akompano de ĝemoj kaj ploro. Iuj observas la kutimon forĵeti poste siajn tekstojn de kinot, esprimante tiel sian kredon pri la alveno de Mesio antaŭ la sekva Naŭa tago de Av. En la malnova tempo la infanoj pligrandigis malĝojon ĵetante pikajn kreskaĵojn en la barbojn de la plenkreskuloj. La fastado en la monato Av finas Tri Semajnojn de la Funebro, komenciĝintajn per la fastado en la Deksepa tago de la monato Tamuz, dum kiu oni ne aranĝas edziĝojn. Nokte, la Naŭan tagon de Av, la Izraelidoj ploris en la dezerto, malesperante pri vortoj de la senditoj, kiuj diris, ke ili povos neniam veni en la Promesitan Landon (Nombroj 14). Pro tiu vana ploro kaj kredomanko ili estis punitaj de la Eternulo. En sia historio la judoj ĉiam havis kaŭzon plori en tiu nokto. Al la aliaj tragikaj eventoj, kiuj estas ligitaj kun tiu ĉi dato, apartenas forpelo de la judoj el Hispa-

nujo (1492). ⇨ Tu-be-ov (la Dekkvina tago de Av, el la hebrea: tu be-av) – festo en la antikva tempo. En tiu ĉi tago oni povis aranĝi edziĝojn inter la Dekdu Gentoj de Izraelo, el kio devenas la kutimo, ke fraŭlinoj paradas antaŭ fraŭloj. Laŭ la Miŝno: „Ne estis por Izraelo tiaj festoj kiel la Dekvina tago de Av kaj Jom Kipur, kiam la filinoj de Jerusalemo paradas en la blanka vesto, pruntita, por ne hontigi tiujn, kiuj ĝin ne havis. Ili dancis en la vinbergardenoj kaj parolis: „Junulo, levu viajn okulojn kaj elektu”. La ĉarmaj knabinoj kuraĝigis fraŭlojn, ke ili elektu belan edzinon. Malpli allogaj, sed venantaj el la estimataj familioj, admonis ilin, ke ili elektu iun kun bona deveno. Tiuj, kiujn distingis nek beleco, nek deveno, atentigis la knabojn, ke elektante sian edzinon, ili lasu gvidi sin ne per la materialaj, sed prefere spiritaj motivoj.

badĥano – gajigisto, kiu amuzas nupotgastojn per ŝercoj kaj spritaj rimkantoj.

bimo – podio en la sinagogo, de kie oni legas la sefer-Toraon kaj gvidas preĝojn. La bimo troviĝas ĉe la muro, vidalvide de la Hakodeŝo (Sankta Kesto). Al la bimo kondukas ŝtupareto.

briso (el la hebrea: bris – „interligo”) – juda ceremonio de la cirkumcido de vira bebo en la 8-a vivotago. Estas la momento, kiam ĉiu judo aliĝas al la interligo, kiun faris la Eternulo kun prapatro Abraham.

ĉulento – rostaĵo el viando, legomoj, grio kaj fazeoloj aŭ pizoj. La tradicia juda plado, kiun oni tenis en varma loko kaj manĝis sabate.

dajano – juĝisto de rabena tribunalo.

ĥupo – laŭ malnovaj judaj kutimoj super la kapoj de la novaj geedzoj oni dismetas baldakenon (en la hebrea lingvo: ĥupo). Ĝi estas farita el ruĝaj silko aŭ veluro kun arĝentfadene brodita David-stelo kaj kun pendantaj franĝoj; subtenas ĝin kvar stangoj.

kugelo – rostaĵo el terpomoj aŭ nudeloj aŭ grio kun diversaj aldonajoj. La tradicia juda plado por la sabatmanĝo.

mezuzo – (ĉe la aŝkenazaj judoj: mezize, el la hebrea: „pordoframo”) – rulaĵo da pergamento enhavanta du unuajn partojn de la Ŝmo, kiujn transskribis sojfero, metita en la lignan aŭ metalan skatoleton kaj kroĉita al la dekstra pordoframo, laŭ Readmono 6:9. La pergamento entenas versaĵojn el Readmono 6:5-9;

11:13-21. Laŭ la kutimo oni devas kisi la mezuzon enirante aŭ elirante el la domo, ĝi ankaŭ memorigas la judojn pri tio, ke ili ne peku. Ĝi certigas prosperon hejme kaj longan vivon. En la Talmudo oni skribis, ke la homan reĝon gardas trupo da soldatoj, sed la Eternulo, Plej Alta Reĝo, gardas siajn regatojn per la mezuzo. Pro la Kabalo multaj judoj vidas en la mezuzo talismanon, kaj la nomon de la Eternulo, skribitan komence de la pergameno, oni akceptas kiel mallongigon de la hebreaj vortoj, kiuj signifas: „gardisto de la pordego de Izraelo”. Laŭ iuj kleruloj skribado de la mezuzoj, sed ankaŭ de la amuletoj, postulas ĝustan, astrologie fiksitajn tempon. Nek demonoj, nek dibuko povas loĝi en la domo kun la mezuzo, kaj malbonaj fantomoj, kiuj vizitus la domon, foriras en la momento, kiam oni kroĉas la mezuzon al la pordo. La mezepokaj tekstoj prezentas eĉ aludojn pri kristanoj, kiuj petis de judoj la mezuzojn por ŝirmi proprajn domojn kaj kastelojn. Kiam la komunumon aŭ familion trafis malsano, katastrofo aŭ tragedio, ĉiujn mezuzojn oni demetis por kontroli, ĉu la teksto ne estas fuŝe skribita. Ankoraŭ praktikas tion hasidoj. Dum la 2^a mondmilito la mezuzoj en la poŝoj de la soldatoj devus forpeli kuglojn, kaj hodiaŭ la judoj portas tre malgrandajn mezuzojn kroĉitajn al ĉeneto sur la kolo kiel amuletan. Mezepokan teologon Majmonidon indignigis magia traktado de la mezuzoj. Li kontraŭstarigis al skriba-

do de la nomoj de anĝeloj sur la pergamenon, ĉar la ordonon, kiu devus plifortigi en la homoj konscian senton pri la Eternulo, oni transformis en ordinarajn sorĉojn.

ŝameso – (el la hebrea): servisto en preĝdomo aŭ ĉe rabeno.

ŝejgeco – bubo, petolulo.

ŝofaro – ŝafkorno, kies sonoj aŭdiĝas en la sinagogo, dum la preĝoj en la tago de Roŝ Haŝone kaj ĉe la fino de Jom Kipur. Ĝi diskonigas la alvenon de Mesio.

taleso (ĉe la aŝkenazaj judoj, el la hebrea: „mantelo”) – kvarangula preĝŝalo kun cicesoj, surmetata de viroj dum la matenaj preĝoj (ŝaĥriso). Taleso estas farita kutime el blankaj lano, silko aŭ kotonon kun nigraj aŭ ruĝaj strioj por memorigi la bluan fadenon (tĥeleton), enplektatan iam en kvastojn. La kutimo portadi taleson devenas el la Bibliaj vortoj: „Parolu al la Izraelidoj kaj diru al ili, ke ili faru al si kvastojn sur la randoj de siaj vestoj [...] kaj ili enmetu en la kvaston de la rando fadenon bluan. Kaj ĝi estu por vi kvasto, kiun rigardante, vi rememoros ĉiujn ordonojn de la Eternulo kaj plenumos ilin [...]” (Nombroj 15:38-39). Oni diras, ke judo en taleso aspektas kiel anĝelo. Mortinton oni enterigas en taleso, fortranĉante la kvastojn de unu angulo. Enterigi iun en koŝera taleso estus mokado pri la mortinto. La krimeaj judoj kaj iuj sefardaj komunumoj uzas taleson anstataŭ ĥupo ĉe nupto.



Plu aĉetebles libroj de nia eldonejo...
feliĉe plu sen VAT-imposto!

Omaĝe al Antoni Grabowski

La 5^{an} de junio ĉi-jare pasis 150^a naskiĝdatreveno de A. Grabowski, kaj la 4^{an} de julio la 86a datreveno de lia forpaso.

Antoni Grabowski apartenis al la piej sindonaj kaj meritplenaj Pioniroj de E-movado. Li ankaŭ grave kontribuis al monda E-movado, aparte al ĝia kulturo.

Sciate, ke flegado de heredaĵo kaj Memoro estas unu el ĉefaj premisoj de evoluo. Grabowski meritas esti memori-gata. De liaj organizaj spertoj oni povas multe ĉerpi, surbaze de kulturaj valoroj kiun Li alportis al E-kulturo, oni povas signife riĉiĝadi.

Mi provas, ankaŭ Jerzy kadre de Esperanto Teatro „Espero”, laŭ ĉiuj niaj eblecoj, flegi memoron pri A. Grabowski. En repertuaro de Varsovia E-teatro „Espero” troviĝas spektaklo – recitalo vort-muzika al li dediĉita.

Neimageble, ke malgraŭ lia riĉiga kontribuo al la Movado, ĝis antaŭnelonge ekzistis nenia funda prilaboro pri lia diverskampa aktivado, kaj aparte rilate riĉigon de E-kulturo. Grabowski per sia eminenta tradukado el la pola Esperanten, ankaŭ signife proksimigis polan kulturon al la mondo, sed ankaŭ lia kontribuo ĉi-rilate ne estas profunde esplorita kaj publikigita. Unu el piej meritaj en popularigado de Grabowski estis Julius Glück. Tamen, prilaboritan de li libron 36-paĝan kaj publikigitan en 1937 s.t. „El la klasika periodo de Esperanto (Grabowski kaj Kabe)” enhavanta en

sia grandparto tradukaĵojn kaj kelkajn originalaĵojn de Grabowski ne povas kontentigi. Valoras aldoni, ke J. Glück plurfoje aŭdigis prelegojn pri Grabowski dum Univesalaj Kongresoj kaj aliaj E-aranĝoj.

La manko de pli vasta verko en prezento de Grabowski grave sentiĝis. Tiukaŭze mi entreprenis esplorojn pri Grabowski. Rezulte, okaze de la 80^a datreveno de lia forpaso, en 2001, estis publikigita de mia aŭtoreco fonta libro, 140-paĝa s.t. „Antoni Grabowski — eminenta Esperanto-aganto”. La dua, vastigita eldono, 159-paĝa aperis en 2002. La verko estis eldonita de Eldonejo „Hejme”, Czeladź, gvidata de Kazimierz Leja, koste de la aŭtorino. La libro estis tre favore akceptita de la Legantoj kaj recenzantoj. Rezulte, nun jam ne multe da ekzempleroj restis por distribuo.

Eldono de tiu libro ne signifis finon de la esploroj pri Grabowski. El daŭraj esploroj rilate apartajn donitaĵojn kaj eventojn, kiujn mi opiniis ne tute klarigitajn kolektiĝis sufiĉa materialo. Ĝi estos prezentita, en aparta suplementa al la libro, eseo.

Samtempe mi traktas kun tre sperta esperantisto, sciencisto en kemio por pretigi pollingvan version de tiu libro. Por tia traduko varme pedas la pranepo de Antoni Grabowski – Bogusław. Oni esperu, ke iam tiu ideo efektiviĝos.

Digne omaĝis al Antoni Grabowski

lige kun supre menciitaj datrevenoj la Esperanto Teatro „Espero”.

La 3^{an} de septembro ĉi-jare, ni lanĉis la 26^{an} teatro-sezonon de nia teatro per programo al Li dediĉita.

Partoprenis ĉi solenaĵon aro da fide-laj spektantoj de Teatro „Espero”. Krome, 4 personoj de la familio Grabowski: lia pranepo Boguŝław kun la edzino kaj kun siaj du filinoj – studentinoj.

Dum la prelego, antaŭanta la spektaklon, mi sin-teze prezentis staton de miaj lastjaraj esploroj pri Grabowski.

Post la prelego Jerzy Fornal prezentis spektaklon bazitan je poemoj de plej gravaj polaj romantikuloj: A. Mickiewicz kaj J. Słowacki en traduko de Grabowski. Ankaŭ fragmentojn de opero „Hal-ka”, fama verko de Wolski kaj Moniuszko same de li Esperantigitan. Aldone poemon de Felikso Zamenhof verkitan tuj post la spektado de „Mazepa” de Juliusz Słowacki, ankaŭ tradukita de Grabowski. En ĉi poemo Felikso esprimas admiron al la aktoroj de la spektaklo, aparte al sinjorino Stanisława Wysocka – plenumantino de ĉefrolo – Amelia.

La poemaro estas interplektita per konforma muziko de Chopin. La prelego samkiel la altnivela arta prezento estis tre bone kaj varmkore akceptitaj de la spektantaro. Sekvis aplaŭdoj, floroj, gratuloj.

Menciindas, ke gesinjoroj Grabowski, post la spektaklo anoncis sin al E-kurso okazonta aŭtune en la Varsovia Filio de Pola Esperato-Asocio.

Vere kontentigas, ke per esploroj kaj arto oni povas kulturi la valoregan Esperanto heredaĵon.

Varsovio, septembre 2007

Letero

Estimata Redaktoro, mi sendas al Vi leteron kiun mi esperas, ke Vi prezentos al la legantoj de „PE”. Unue, mi kun kontento konstatas, ke la revuo liveras multe da variaj, kaj interesaj kontribuajtoj: informojn rilate nian komunaĵon. Ankaŭ tiajn, kiuj pensigas kaj stimulas al aktivado, tiom bezona en nia, bedaŭrinde ĉiam pli ŝrumpiĝanta Movado.

Ĉi-leteron kaŭzis, por mi tute ne komprenebla, letero de s-ano Lech Piotrowski (en PE 4/2007), eĉ iasence ĝi ĉagrenis min, ĉar konante lian longdaŭran aktivadon, aparte en Bjalistoko, mi alte aprezas lin. Ankaŭ nun, en tre malfacilaj kondiĉoj li kiel prezidanto de Varsovia Filio de PEA aktivis laŭeble favore al la Movado. Kol. Piotrowski decidis rezigni pri abono de PE pro publikigo en ĝi de artikolo plume de konata esperantisto, rekonata scienculo Ignacio Ramonet, prof. de Universitato en Parizo, verkinto de pluraj libroj en branĉo geopolitiko (legu informan artikolon en PE 3/2007). Mi deziras rimarkigi, ke absoluta neŭtralismo ne povas karakterizi movadojn, kiuj pretendas esti avangardaj, celantaj juston en homaj rilatoj. Manko de reago en kazo, kiam oni persekutas homojn, same prisilento de ĉikanado kaj malrespekton al homa digno, oni devas konsideri simple kiel nocivan hipokritecon. Tia sinteno devas esti ne allasebla en E-movado. Devigan memdenuncon kun minaco perdi laboron en kazo ajna kunlaboro kun sekuraj instancoj, same deviga klarigo, ke oni ne kunlaboris kun sekuraj instancoj, kaj ĉi leĝo validus rilate homojn okupantaj gravajn postenojn: profesorojn, ĵurnalistojn, direktorojn

de diversaj kulturaj establoj kaj similaj, oni devas konsideri ne nur ne pravigitaj, sed ankaŭ tre damaĝaj. Cetere rilate kunlaboron kun la sekuraj instancoj estis diverse. Pluraj kunlaboris troige... por altigi sian prestiĝon kaj ĉerpi profitojn, kaj al tiuj, kiuj trouzis sian povon devas esti aplikata, akorde al la Konstitucio, leĝaro. Nepras anakŭ rilati al sociaj organizaĵoj kiuj per sia troiga kunlaboro kun la sekuraj instancoj malutilis grave al apartaj personoj kaj same al organizaĵoj, asocioj, kiuj per trouzo de sia regopovo grave malutilis bremsante evoluon direkte al demokratiigaj procezoj. Tio kompreneble inkluzivas ankaŭ Esperanto-movadon. Ĉi kaze post profundaj esploroj, oni devas apliki justan moralan... „kodon”. Ne temas pri punado, sed per ĝustaj konkludoj rilati cele eviti nune kaj en estonto malbonajn fenomenojn kaj tiamaniere altigi idean kaj moralan nivelon de la Movado.

Pluraj el inter civitanoj estis iasence manipolitaj eĉ devigataj per diversspecaj minacoj al tiu kvazaŭa aŭ efektiva kunlaboro. Apliki komunan respondecon, kaŭzi etoson, ke la civitanoj ne sentas sin sekuraj en sia propra lando estas nenio alia ol principa trouzo de regopovo fare de ŝtataj instancoj. Tiel opiniis Pola Konstitucia Tribunalo verdiktante, ke tiu leĝo kaj procedo de ŝtataj instancoj ĉi rilate estas malakordaj al pollanda leĝaro, do ankaŭ al la Konstitucio. Tiukaŭze malakceptis ties efektivigon.

La artikolo de Ignacio Ramonet publikigita en „La Monde Diplomatique” kaj represita en PE 3/2007 p. 10-11, prezentas nur tion kio fakte nun okazas en Pollando kaj kiel malakorda al demokratio devas esti kritikata kaj forigata. Laŭ mi,

estas bone konsciigi la socion pri negativaj fenomenoj kiuj bremsas evoluon de Pollando, tirante la landon malantaŭen. Falsaj ambicioj, ke neniu ekster Pollando rajtas nin kritiki, apartenas al unu el plej negativaj trajtoj, fenomenoj de nia nuntempo. Ni devas konscii, ke troa ambicio negative influis ankaŭ pasintecon de nia lando.

D-ro Zamenhof, plurfoje en kazoj kiam evidentiĝis maljusto, reagis kritike. Oni povas tion konstati legante liajn paroladojn. Temas tamen ne nur pri la paroladoj. Tio evidentiĝis ankaŭ en liaj protestoj i.a. „Protesto” kontraŭ pseŭdo-sciencaj artikoloj de Andrzej Niemojewski, apogata de kelkaj tiamaj E-aktivuloj, publikigitaj en maja kaj julia n-roj de 1915 j, en *Pola Esperantisto*, surfone kiuj efektivigadis naciismo de la aŭtoro. *Pola Esperantisto* ne publikigis la „Proteston” de kreinto de Esperanto, sed kelkaj aliaj E-revuoj faris tion. Poste, tiu kaj aliaj protestoj de avaraj esperantistoj ektroviĝis en „ludovikitoj”. Bedaŭrinde, ankaŭ en intermilita periodo, kaj ĝis nun neniu esperantisto krom mi, subigis al kritiko antisemitismajn atakojn, „science” spicitajn, kontraŭ judismo, Esperanto kaj Zamenhof persone. La afero estis evidentiĝita kaj al nie pollanda movado postrestis nur makulo kaj honto.

Mi volas fini tiun artikolon per opinio de prof. Ivo Lapenna. Laŭ zamenhofologoj la plej eminenta konanto de la Movado kaj interpretanto de idearo de la kreinto de Esperanto. Jen lia opinio pri neŭtraleco:

„Necesas ankoraŭfoje emfazi, ke UEA kiel tia estas politike neŭtrala, sed tio neniel implikas, ke ĝiaj membroj es-

tus en kiu ajn senco senigitaj de sia rajto havi proprajn politikajn aŭ aliajn konvinkojn. UEA ne estas, nek laŭ sia Statuto povas esti, neŭtrala koncerne kiun ajn aspekton de la lingva problemo, inkluzive la politikan, aŭ rilate kiun ajn formon de diskriminacio kaj persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo aŭ la Esperanto-organizaĵoj. Strikta observado de tiel difinita principo de neŭtraleco estas unu el la bazaj kondiĉoj de la universaleco de UEA kaj tial ankaŭ de ĝia sukcesa laboro". („Esperanto en Perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri Internacia Lingvo". Eldonita de UEA en 1974, p. 798. Ĝin verkis prof. Ivo Lapenna kunlabore kun kelkaj elstaraj E-sciencistoj).

Mi alvokas al pripensoj de supre cititaj frazoj. Enprofundiĝo en kerno de opinio de prof. Lapenna povus eble helpi al forigo de falsa opinio pri neŭtraleco. Sekve pli reagi al gravaj fenomenoj rilate politikon kaj kulturon. Tia aktiveco, kiun prof. Lapenna nomis: aktiva, humaneca neŭtralismo. Laŭ mi tio pli bone efikus ol fermo de okuloj en ĉeesto je malbono kaj maljusto reganta en socio. Ĝi vekos pli multe da favoro al Esperanto ol „komforte" komprenata neŭtraleco.

Legante la eldirojn de novelektita prez. de UEA — Probal Dasgupto dum ĉi-jara UK en Jokohamo kaj lian ferman paroladon oni sentas, ke li deziras direkti la Movadon pli, ol ĝis nun, al engaĝiĝo socia. Temas ne nur pri efektiva interna kunlaboro de aktivularo. Ne nur inter la esperantistoj de Oriento kaj Okcidento, sed multe pli vaste, laŭ kompreneblaj modestaj eblecoj, pli vaste laŭeble servi al solvo de ĝeneralsociaj nuntempaj problemoj. Tio esperigas, ĉar tion celis Zamenhof, Lapenna, la laborista

Esperanto-movado kaj pli vaste idealistoj – adeptoj de Homaranismo.

Mi deziras fini tiun leteron, de kiu malgraŭvole ekestis artikolo per tute kontraŭa ol sugestas kol. Lech Piotrowski.

Karaj Samideanoj, legantoj de *Pola Esperantisto*. Vi nepre ne nur persone reabonu nian nuntempe, ununuran en Pollando, Esperanto-revuon, sed ni abonigu aliajn. Ni vaste kunlaboru kun la redaktoro, kiu devante labori profesie por sin kaj la familion vivteni, li plene, tute senprofite sin dediĉas al redaktado de la revuo. Kunlaborante, ni anstataŭu fojfoje, falsajn ambiciojn, evidentigu malfermitecon rilate tion kio okazas ĉe ni, en Pollando, sed ankaŭ eksterlande kaj per tia sinteno ni igu eksterlandajn esperantistojn abonigi ĝin.

Laŭ mi, neŭtraleco signifas juston en aprezo de tio kio estas „nia" kaj same de aliuloj. Tio estas nepre por privilegii nian pollandan, bedaŭrinde stagnantan movadon kaj por kontribui pli vaste al nia E-komunumo.

Al kol. Kazimierz Leja, kiun mi konsideras ne nur idealiston en plej bona senco, sed ankaŭ spertan redaktoron kaj eldoniston, mi deziras elteneblon. Antaŭen kun fido kaj espero, Kara Amiko!

Kun samideana saluto

Zofia Banet-Fornalowa

[red] Ĉar la letero de Zofia venis fine de septembro, kelkaj eldiroj rilate al *Pola Esperantisto* fariĝis por mi persone neaktualaj. Malgraŭ tio mi instigas la legantojn plu abonigi la „novan" PE kaj ankaŭ la „Spegulon". Informojn pri ambaŭ titoloj vi trovos interne de ĉi-numero.

KL

La prepozicio PRI en praktika uzado

Tiu ĉi prepozicio signifanta **koncerne al, rilate al** estas uzata en jenaj situacioj:

1. Post verbo, por montri la objekton, okaze de kiu fariĝas la ago. Ekz.: D-ro Ludoviko Zamenhof zorgis **pri** facileco de Esperanto. Oni devas memori **pri** korekta uzado de akuzativo. Tradukado ofte devigas esperantistojn mediti **pri** tiu aŭ alia esprimo. Mi ekinteresiĝis **pri** instruado de Esperanto laŭ rekta metodo. Ŝi interese rakontis **pri** ĉio, sed juĝistoj ne kredis **pri** ŝia senkulpeco. Ĉiu homo rajtas disponi **pri** sia propra persono kaj **pri** siaj havaĵoj. Oni malprave ŝin akuzis **pri** korupto. Riĉulo zorgas **pri** ĉampano, malriĉulo **pri** pano. Gefamilianoj neniam dubis **pri** ŝia sukceso. Klopodi **pri** ĉies favoro estas la plej malsaĝa laboro. Ne ĉiu vendisto garantias **pri** la kvalito de siaj varoj. Oni ne povas disputi kun li **pri** ĉio. Estas pli facile iun ofendi, ol peti **pri** pardono.

2. Post adjektivo, por montri la kaŭzon de la sento aŭ animstato.

Ekz.: Ne ĉiu virino estas kontenta **pri** sia sorto. Li estas malkontenta **pri** ĉio, kion faras aliuloj. Ŝi estas tre diligenta **pri** instruado de Esperanto. Multaj homoj estas spertaj **pri** komerco. La kuracisto ne estis kulpa **pri** la morto de mal-sanulo. Ŝi ne estis konscia **pri** tio, kion ŝi faris. Li estas nekompetenta **pri** multaj aferoj kaj samtempe ĵaluza **pri** sia edzino. Ŝi estas avida **pri** riĉaĵoj, kiujn havas aliuloj. Senlaborulo ne estas trankvila

pri sia morgaŭa tago. Mi estis certa **pri** la sukceso de Civitana Platformo.

3. Post substantivo, por montri la temon (tion, kion ago traktas aŭ koncernas). Ekz.: Mia amikino instruas sian infanon **pri** Esperanto (= Ŝi instruas Esperanton al sia infano). Ŝi tute ne havas ideon **pri** tiu arto kaj li havas nenian ideon **pri** la muziko. Lia antaŭjuĝo **pri** rasoj ne estas akceptebla de ni. La demando **pri** estonteco de la lingvo internacia estas plu aktuala en multaj landoj. La decidon **pri** la Universala Kongreso en Bjalistoko ni akceptis kun granda ĝojo. Li publikigis sian rezignon **pri** kandidateco al la posteno de direktoro. Intersaj estas esploroj **pri** la faŭno de la Balta Maro. Li estas profesoro **pri** lingvistiko. Ankoraŭ freŝa estas nia memoro **pri** la morto de Johano Paŭlo la Dua.

La prepozicio PRI funkcias ankaŭ kiel prefiksoido:

- **pridubi** (= dubi pri io) – Mi pridubas ĉiujn liajn asertojn.
- **prifajfi** (= moke fajfi, por malaprobi iun aŭ ion)
- **prifriponi** (= trompe priŝteli) – Li ofte prifriponas la gapantojn.
- **prikanti** (= glori aŭ pie rememorigi per kanto)
- **priparoli** (= pritrakti ion per interparolado) – Ni jam ĉion priparolis.
- **priplanti** (= provizi per plantoj) – Li priplantis ĝardenon per rozoj.

- **pripluvi** (= akvumi per pluvo) – Nia kampo estis hieraŭ pripluvita.
- **prirabi** (= rabi de iu ion) – Servistino prirabis du maljunulojn.
- **pririgardi** (= atente, detale rigardi) – Ŝi pririgardis lian domon.
- **prisemi** (= diŝjeti semon en ion) – Li jam prisemis la ĝardenon.
- **prisilenti** (= silenti pri io) – Ŝi prisilentis la koruptan aferon.
- **priskribi** (= distinge kaj vive prezenti ion per vortoj)
- **pristeli** (= senigi iun aŭ ion de io) – Ŝi pristelas nur sengardulojn.
- **pritrakti** (= pridiskuti) – Li serioze pritraktis ĉion antaŭ la edziĝo.
- **priverŝi** (= malsekigi verŝante) – Ŝi jam priverŝis ĉiujn florojn.

Jen kelkaj proverboj kun la prepozicio PRI, troviĝantaj en la *Proverbaro Esperanta*, prilaborita de Ludoviko L. Zamenhof:

- Pri tio jam ĉiuj paseroj babilas.
- Pri propra afero neniu juĝas libere.
- Pri ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo.
- Pri lando malproksima estas bone mensogi.
- Pri laboroj maldiligenta, pri festoj plej kompetenta.
- Pri kio amikoj sekretas, ili vian juĝon ne petas.
- Pri havo najbara oni estas malavara.
- Pri gustoj oni disputi ne devas.
- Pri dolĉa vorto ne fieru, maldolĉan ne koleru.
- Pri pensu malrapide kaj agu decide.

Forpasis Szilveszter Ördögh, ĉefredaktoro de *Tekintet*

En la kvindeknaŭa vivojaro, la 16^{an} de novembro, forpasis Szilveszter Ördögh, hungara verkisto, posedanto de la Premio Attila József, ĉefredaktoro de *Tekintet*.

Szilveszter Ördögh verkis multe da popularaj noveloj kaj romanoj, el kiuj estas faritaj ankaŭ tv- kaj radioludoj. Li kreis signife ankaŭ kiel tradukisto, li hungarigis la verkojn de francaj kaj vjetnamiaj verkistoj.

El liaj verkoj elstaras *La monto de kranioj* (*Koponyák hegye*, 1976) kaj *Herezaj skribaĵoj* (*Eretnek írások*, 2000), kiuj kongruas kiel unueca logika sistemo. Li nun volis verki la trian volumon de la trilogio.

Liaj konataj verkoj estis ankoraŭ *La ĉevalido* (*A csikó*, 1973), *Pordegoj en Tebo* (*Kapuk Thébában*, 1978), *Certe vi ne mortos* (*Bizony nem haltok meg*, 1979), *Versioj Redemptori* (*Változatok megváltásra*, 1982), *Paco de Lázár* (*Lázár békéje*, 1985), *Rozo kun sekreta senco* (*Titkos értelmű rózsza*, 1986), *Tamburas la neĝo* (*Dobol a hó*, 1991), *Ankaŭ la libro min legas* (*A könyv is olvas engem*, 1993) kaj *Kranio-kavo* (*Koponyaüreg*, 1994).

Szilveszter Ördögh naskiĝis la 28-an de oktobro 1948. en la urbo Szeged. En 1973 en la Budapeŝta Sciencuniversitato Loránd Eötvös li akiris diplomon en la hungara-franca fako. Ekde 1973 li estis stipendiito de la Teatro- kaj Filmarta Altlernejo, ekde 1975 redaktoro de Eldonejo *Magvető* ('Semanto'), ekde 1983 rubrikestro de *Új Írás* ('Nova Verko'), en kiu li aperigis la kompletan volumon *Infanoj de l' atombombo*, hunga-

rigitan el Esperanto. En 1988 li fariĝis ĉefredaktoro de *Tekintet* ('Rigardo'), kultura revuo de Hungara Esperanto-Asocio. En la revuo li aperigis plurcent verkojn tradukitajn el la Esperanta literaturo (inter ili fragmentojn el la *Infana Raso* de William Auld) kaj plurdek novelojn el la literaturo de la malgrandaj nacioj tradukitajn pere de Esperanto. Li bonvenigis ĝis la lastaj minutoj verkojn de talentaj, verkemaj esperantistoj, Li ĉiam, kiam nur eblis, pledis por Esperanto en diversaj kulturaj kaj politikaj forumoj. Entuziasme li salutis la Esperantan poemplibron de Attila József. Li havis amason da planoj rilate al la kultura utiligo de Esperanto precipe en la internacia kultura interŝanĝo. Lia merito estas, ke li sukcesis konservi tutlande rekonatan, prestiĝan, literaturan revuon por Esperanto eĉ kiam HEA preskaŭ komplete disfalis pro diversaj misagantaj gvidantoj. Por karakterizi lian kredon, ni citu el iu lia artikolo: „Ni deziras oferti spertigajn legaĵojn destinitajn por cerbumigi kaj konsciigi. Ne malstreĉan amuziĝon, ne kanonozan agitadon. Ni estas nek urbaneskaj, nek popoleskaj, sed ni volas fariĝi nek kosmopolitoj, kaj malpli ni volas esti principoŝanĝaj kibicoj de ajna ŝak- aŭ kartludo de la politiko.”

Inter 1996 kaj 2000, kaj ekde 2002 li estis estrarano de la kuratorio de Publika Televida Fonduso *Hungária* inspektanta Televidon *Duna* ('Danubo'). Li akiris, ke certa parto de la programo rekte rilatu al la hungara kulturo, kaj la filmoj ne estu interrompataj de reklamoj.

Lia verkista agado en 1974 estis rekonata per Premio Attila József.

„Szilveszter Ördögh, kiu estis ĝenerala sekretario ankaŭ de la Societo 21-a

Jarcento, estis postmorte distingita per la premio *Hazám* ('Mia Patrujo') fondita de la Societo” – informis András Sándor Kocsis, prezidanto de la Societo.

Per tiu ĉi premio (kies nomo estas titolo de sonetkrono *Mia Patrujo* verkita de Attila József) la kuratorio de la Societo ĉiujare distingis eminentulojn, kiuj havis rimarkindan agadon en la publika pensado, respektive en la scienca, kultura kaj arta vivo de la lando, kiuj servis Hungarion per sia vivoverko.



Szilveszter Ördögh

Salute al la Attila József – tradukaĵoj de Imre Szabó

Mi estas influita. De Attila József multoble, kun eterna hontosento. Kaj mi ekamis Imre Szabó en la turmentaj baraktadoj de senhelpecoj, en la jam-jam naive puraj intencoj de la reciprokaj interdependo – prefere interbezono. Mi kredas kaj scias lin mia amiko. Sekve mi estas maltaŭga teni distancon, prezenti senpasiajn, valormezurajn vortojn. (Kaj aldone mi eĉ Esperante ne scias.) Tamen.

Mi sentas puran ĝojon aŭdante la nuran fakton, ke Imre Szabó komencis la poemajn de Attila József Esperantigi formante libron – post tiom da sporadaj iniciatoj. Traduki en artefaritan lingvon kun obsedita misio, en lingvon de mesaĝoj kaŝitaj de botelo ĵetita en la maron, en lingvon facile lerneblan, facile kompreneblan. Ĉar eble iuj tralegos, komprenos ĝin en la mondo ie. Ĉar eble iuj plene sentos la hereditajn „forno”-esperojn de Attila József terurigiinta senespera, la sola restintan, orfiĝintan kredon.

Kiu sama estas ankaŭ la senhelpe volanta kredo de Imre Szabó, kaj ĝuste per tio, ke en laboratorie pura lingvo li resonĝis tiujn poemojn en la angla-usona mediobabela voĉo- kaj lingvo- kaj parolkaoso. Por ke estu, povu esti iu, digne al Attila József, estonta heredaĵo al la homvizaĝa esperado.

Kaj evidente tio estas nur la unua libro. Estas bezonataj ankaŭ la dua eble tria volumoj por ke kompletu la vivoverko-sorto, la heredita testamento. Jam ne tiom pro Attila József ol pro ni.

Tradukis Imre Szabó



Antaŭparolo al la unua numero de la revuo *Tekintet*

Ni ŝatus publikigi ion homan, senan je antaŭjuĝoj kaj antaŭformitaj ideoj, konsciante tamen ke en ni mem povas troviĝi antaŭjuĝoj kaj antaŭformitaj ideoj, kaj konsciante ke nia intenco indiki samtempe realon kaj veron postulas ke ni formu juĝojn.

Ni kredas ke niaj intencoj koncernas, malrekte, la esencon de la Zamenhofa idealo, de la spirito de Esperanto. Zamenhof kreis artefaritan lingvon por ke naturaj povu iĝi finfine la konsciado kaj praktikado de l' kunaparteno. Ni ekiras ekde natureco, cele al natureco. Nia Tekintet estas hungarlingva kultura revuo - ankaŭ cxi tion ni opinias difine natura afero. Same la fakton ke ni gxin redaktas, nefordisputeble, estante hungaroj. Sed ni ja kredas ankaŭ ke la adjektivo „hungara” gajnas sian plenan signifon nur apud la substantivo „homo”.

Tekintet 1988/1, p. 3.

Tradukis István Ertl

Resumo de la letero de Ĉefa Estraro de PEA al polaj esperantistoj



Estimataj Esperantistoj!

Koncerne la ŝanĝon de eldonisto kaj redakcio de Pola Esperantisto ni invitas aboni la revuon (eldonotan) en nova formo. De la jaro 2008 PE estos (denove) la organo de Pola Esperanto-Asocio, malfermita je informoj de esperantistaj organizaĵoj funkciantaj en Pollando kaj ekster limoj. PE havos karakteron antaŭ ĉio informan. Ni planas novajn sekciojn, ekzemple: kalendaro de eventoj en Pollando, lingvaj konsilioj, raportoj pri esperantistaj renkontiĝoj, interreta anguleto, por poetoj, anguleto por Animzorganto, opinioj (kie legantoj povus proponi iun temon) kaj aliaj, proponotaj de kunlaborantoj aŭ abonantoj.

La nova gazeto informados pri aktualaĵoj el la pola movado, inkluzive de aferoj pri reaktivigo de tradicio de landaj esperantistaj kongresoj, preparoj por la UK 2009, informoj el filioj kaj kluboj, valoraj iniciatoj, novaj agadplanoj.

Ni tre dankas al la ĝisnuna eldonisto Kazimierz Leja – posedanto de la eldonejo HEJME por kelkjara kunlaboro kaj granda peno por reaperigi kaj popularigi la revuon. Ni esperas, ke PE ne malaperos de nia merkato kaj per komunaj fortoj ni povos kontinui ĝian eldonadon[...]

Ni kreu komune la novan PE por ke ĝi plenumu niajn ekspektojn.

La unua numero de nova PE aperos januare/februare 2008. PEA petas pri abonoj, konsilioj kaj proponataj temoj.

Szanowni Esperantyści!

W związku ze zmianą wydawcy i redakcji dwumiesięcznika **Pola Esperantisto** zapraszamy do abonowania pisma (wydawanego) w nowej formie. Od roku 2008 **PE** będzie (ponownie) organem Polskiego Związku Esperantystów, otwartym na informacje od organizacji esperanckich działających w Polsce i poza jej granicami. **PE** będzie miał charakter przede wszystkim informacyjny. Planujemy nowe działy takie jak: kalendarz imprez w Polsce, porady językowe, relacje ze spotkań esperanckich, kącik internetowy, dla poetów, kącik dla Animzorganto, opinie (gdzie czytelnicy mogliby podpowiedzieć jakiś temat) i inne, które zostaną zgłoszone przez współpracujących lub abonentów.

Nowe pismo będzie informowało o aktualnościach z polskiego ruchu, w tym sprawy dotyczące reaktywowanej tradycji krajowych kongresów esperanckich, przygotowania do UK 2009, wieści z oddziałów i klubów, cenne inicjatywy, nowe programy działania.

Dziękujemy bardzo dotychczasowemu wydawcy Kazimierzowi Leji – właścicielowi wydawnictwa HEJME za kilkuletnią współpracę i duży wysiłek w reaktywowanie i popularyzowanie czasopisma. Wierzymy, że **PE** nie zniknie z naszego rynku i wspólnymi siłami będziemy mogli kontynuować jego wydawanie. Chęć współpracy przy **PE** zgłosili m.in.: Barbara Pietrzak, Danuta Kowalska, Elżbieta Karczewska, Roman Dobrzyński, Gabriela Kosiarska, Czesław Baranowski, Stanisław Mandrak, Halina Komar, Robert Kamiński i inni, z których wyłoniona będzie redakcja.

Twórzmy wspólnie nowe **Pola Esperantisto** tak aby spełniało nasze oczekiwania.

Prosimy o poparcie naszych działań i abonowanie **Pola Esperantisto**. Oczekujemy na uwagi co do przyszłej zawartości pisma.

Pierwszy numer planujemy wydać na przełomie stycznia i lutego 2008. Prosimy o dokonywanie przedpłat w wysokości 35,00 zł za 6 numerów, *najchętniej* do 15 stycznia 2008 na konto Oddziału Łódzkiego PZE. Właścicielem formalnym konta jest skarbnik Oddziału PZE w Łodzi – Zofia Śmistek. Konto to będzie służyło do prenumerat tymczasowo, do momentu założenia nowego konta Zarządu Głównego PZE.

Konto bankowe PZE Oddział w Łodzi:

mBank PL 90 1140 2004 0000 3902 3345 7320,

Adres posiadacza konta: Zofia Śmistek,

ul. Gnieźnieńska 13/16 m. 38, 91-046 Łódź

aldonu/dodaj: **Pola Esperantisto 2008**

Devigaj informoj por eksterlandanoj pri pagoj

kod BIC/SWIFT mBanku: BREXPLPWMBK

nomo kaj adreso de banko:

BRE Bank SA INTERNET BANKING, al. Mickiewicza 10, 90-050 Łódź

SORT CODE/numer rozliczeniowy – 11402004

W imieniu Zarządu Głównego

Sekretarz Robert Kamiński

Distra duonpaĝo

Virinaj meditadoj

Kiu povas kompreni virojn?

1. Afablaj viroj estas malbelaj.
2. Belaj viroj ne estas afablaj.
3. Belaj afablaj viroj estas gejoj.
4. Belaj afablaj viroj ne-gejoj estas edziĝitaj.
5. Viroj, kiuj ne estas tro belaj, sed estas afablaj, estas senmonaj.
6. Viroj, kiuj ne estas tro belaj, sed estas afablaj kaj havas monon, pensas, ke ni avidas ilian monon.
7. Belaj viroj senmonaj avidas nian monon.
8. Belaj viroj, kiuj ne estas tro afablaj kaj estas ne-gejoj, pensas, ke ni ne estas tro belaj.
9. Viroj, kiuj pensas, ke ni estas belaj kaj ili estas ne-gejoj kaj estas iom afablaj kaj havas monon, estas timuloj.
10. Viroj, kiuj estas iom belaj kaj iom afablaj kaj havas monon kaj danke al dio ne estas gejoj, estas sinĝenaj kaj neniam iniciatas kontakton.
11. Viroj, kiuj neniam iniciatas kontakton, tuj perdas intereson, kiun ni iniciatas.

Kiu povas diable kompreni virojn?

Viroj estas kiel vino. Ili similas vinberojn kaj ni devas ilin presi kaj teni flanko, ke maturiĝu kaj ili povu esti por utilo post vespermanĝo.

Transdonu la konsilojn al alia aĝa virino, kiu deziras ridi, kaj al viroj, kiuj estas kapablaj primajstri la aferon.

El popola trezorkesto

Mesaĝo el Nov-Kaledonio

Estimataj!

Kun granda plezuro mi legas viajn informojn pri la estonta «Spegulo».

Tian plej aplaŭndan aferon mi certe honoros, ĉar ne nur allogas min ĝiaj teoriaj aspektoj, sed ankaŭ emocie mi sentas koran inviton: mi famili-iomete estas poldevena (sed bedaŭrinde tute ne regas la lingvon).

Mi naskiĝis en Berlino, kaj spertis tie tiom triste la feran kurtenon kaj poste festis ties forfalon (tiam jam loĝante en Francio), kaj nun instruas Esperanton en Nov-Kaledonio...for – for – for... sed tamen...

Vi povas trovi min kiel UEA-delegiton en la jarlibro 2007 (p. 221)

Kion alian diri al vi ol «ek, al laboro!»

Tre amikece via

Lena Leroy

Arĥivo de E-disaŭdigoj

De 6 jaroj mi kolektas en mia komputilo sondosierojn de la Esperanta Redakcio de Pola Radio, en Real Audio kaj MP3 formatoj.

Se iu interesiĝas pri aĉeto de DVD-diskoj kun la disaŭdigoj, turnu vin al la Eldonejo Hejme. La prezo kovras nur kostojn de DVD-diskoj kaj sendokostojn.

Deziras korespondi:

Mi estas 56-jarulo, studento de Esperanto ĉe la Universitato de la Tria Aĝo en Siedlce. Mi volas korespondi en la internacia lingvo, por perfektigi mian konon de Esperanto kun gesamideanoj el vojevodioj: silezia, mazovia kaj ankaŭ el Slovakio.

Mia adreso:

Zdzisław Baran, ul. Wiatraczna 7 m 13
PL 08-110 SIEDLCE